Esperanto-...
I., Himmelpfortgasse 6
(Café Frauenhuber)

1923
JANUARO
NUMERO 1 (4)
DUA JARO

# LITERATURA MONDO



RESPONDA REDAKTORO:

D^RO^ TEODORO SCHWARTZ

*

REDAKTA KOMITATO:

JULIO BAGHY

D^RO^ KOLOMANO DE KALOCSAY

PAŬLO DE LENGYEL

PAŬLO BALKÁNYI

ADALBERTO BAYER

*

NIA KUNLABORANTARO: LOUISE BRIGGS (ARMLEY), J. GRAU CASAS (BARCELONA), F. E. HAINE (BRUXELLES), NIKOLAO HOHLOV (ZAGREB), DRO EMIL PFEFFER (WIEN), IVAN H. KRESTANOFF (DRESDEN), PAUL MEDEM (KAUNAS), EMMA H. OSMOND (LONDON), M. SOLOVJEV (SKOPLJE), JULIO WERNER, DRO ALEKSANDRO GIESSWEIN (BUDAPEST), DRO LEONO ZAMENHOF (VARSOVIO)

REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO:
BUDAPEST, VI,
ANDRÁSSY-UT 81

PRESITA: GLOBUS PRESARTINSTITUTO A. S.

# MALGRANDAJ ANONCOJ

F-ino ELIZABETO ZIMMERMANN, Budapest, VII, Dob-utca 108, Hungarujo, kolektas kaj interŝanĝas poŝtmarkojn kaj monbiletojn, vendas laŭ mankolisto kaj seriojn da hungaraj poŝtmarkoj.

E. CRAGO, Keightley St., Henty N.S. Wales, Aŭstralio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

ELDONISTOJ kaj verkistoj! Se vi deziras esti menciita en katalogo, tuj sendu vian verkon al nia adreso. Se priparolado estas dezirata, oni sendu po 2 ekzempleroj. Adreso: Al S-ro bibliotekisto de l' Grupo Esperantista Pariza 3, rue Thénard, Paris Ve.

INTERNACIA MEDICINA REVUO. Spegulo de la progreso de medicino. Referatoj de la tuta mondo. Adreso de la redakcio: D-ro Karlo Mezey, Budapest, VI, Teréz-körut 4. Adreso de la eldonejo: „Kultura", VI, Teréz-körut 5.

KLEIN MIKLÓS, Budapest, Teréz-körut 6, universitatano deziras interŝanĝi por valoraj esperantaĵoj noveldonitajn francajn kaj germanajn librojn.

GRUBER & BÖHM, Pécs, Király-utca 8, Hungarujo, rekomendas siajn sukeraĵojn „Esperanto".

## ABONU LA „LITERATURA MONDO"-N!

**Prezo de unu numero: 1 svisa franko aŭ egalvaloro.**

### ABONPREZO POR UNU JARO:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 2.— dolaroj | 10.— svis. frankoj | 10.— norv. kronoj | 40.— liroj |
| 5.— guldenoj | 10.— danaj kronoj | 12.— pesetoj | 60.— ĉ. kronoj |
| 7.— sved. kronoj | 25.— fr. frankoj | 10.— ŝilingoj | 5.— jenoj |

### ABONOJN BONVOLU SENDI LAŬEBLE AL NIA ADRESO, AŬ EN LA SEKVANTAJ LANDOJ VI POVAS ABONI ĈE NIAJ ABONEJOJ:

*Argentino:* Irenjo Balkányi, Pels y Lakatos, Buenos-Aires 2, 25 de Mayo 194.
*Aŭstrujo:* Wien, Esperanto-eldonejo „Nova Tempo", VI., Mollardgasse 55.
*Britujo:* The British Esperanto Association, 17 Hartstreet, London, WC. 1.
*Bulgarujo:* Centra Librejo Esperanto (Gaŝevsky) Sofia.
*Belgujo:* Franz Schoofs, 45 Kleine Beerstraat. Antwerpen, Poŝtĉekkonto No 284. 20. — E. Haine, 23, rue du Marais, Rysbroek, Bruxelles.
*Ĉehoslovakujo:* Otto Sklenĉka, Hradec Králové.
*Danujo:* Martin Blicher, International Boghandel, Hotel d'Angleterre, Kobenhavn.
*Estujo:* Helmi Dresen, postkast 6, Tallin.
*Finnlando.* O/Y. Movado A/B. Helsinki, Kasarminkatu 20.
*Francujo:* Raymond Schwartz, 4, rue d'Haute ville, Paris.
*Hispanujo:* Konrado Domenech, Hotelo Flora Banyoles, Ĝirona. — Ferdinando Montserrat, Barcelona, Str. Villaroel 107, 2o 2o.
*Italujo:* Johano Mainardi. Viale Vittoria 1, Milano 21.
*Jugoslavujo:* D.D. Maruzzi, Zagreb, Jezuitska-ul. 1.
*Latvujo:* Talivaldo Indra, Posta kaste 475, Riga.
*Polujo:* Adolfo Oberrotman, Krak. Przedm. 10. Warszawa (P. K. O. n-o 3125).
*Rumanujo:* Esperanto Oficejo, Cluj.
*Svisujo:* Esperanta Librejo „Verda Stelo" Rosenheimstr. 5, St. Gallen-Ost.

**LAŬVOLE SENDU ALTAN SUMON KAJ NI LIVEROS TIOM DA NUMEROJ, KIOM VALORAS LA PAGO!**

Vi povas ankaŭ pagi per ia ajn banko al sekvantaj naciaj bankoj, por la konto de Hungara Ĝenerala Kreditbanko (Banque Générale de Crédit Hongrois, Ungarische Allgemeine Creditbank), Budapest, por „Literatura Mondo":

### NACIAJ BANKOJ:

*Amsterdam:* Amsterdamsche Bank
*Bratislava:* Slovenská Všeobecná Úverná Banka
*Berlin:* Direction der Disconto Gesellschaft
*Bruxelles:* Banque de Bruxelles
*Christiania:* Den norske Creditbank
*Copenhague:* Kobenhaven's Handelsbank
*Milano:* Banca Commerciale Italiana
*London:* The National Provincial & Union Bank of England Ltd.
*New-York:* Guaranty Trust Comp of New-York
*Paris:* Banque de l'Union Parisienne
*Sofia:* Banque Balkanique
*Stockholm:* Skandinaviska Kreditaktiebolaget
*Zürich:* Schweizerische Bankgesellschaft

**Se vi senpere al ni sendas la abonpagon, vi rajtas depreni la sendkoston!**

# LETERO PRI „KARMA“*

DE L. N. TOLSTOJ — AL VLAD. SISOEV

Beljaevka, la 7-an de februaro 1892

Vi min demandas pri la budhista ideo „Karma“. En songô ni vivas preskaŭ same, kiel en maldormo. Pascal diras, ŝajne, tiel: „Se ni estus vidintaj nin en songô ĉiam en la sama stato, kaj en maldormo en diversaj statoj, ni opinius songôn realaĵo kaj realaĵon — songô.“ Tio ne estas tute ĝusta. Realaĵo diferencas de l' songô per tio, ke ĝi estas pli fakta, pli reala. Do mi dirus tiel: Se ni ne estus konantaj la vivon pli reala ol la songôn, ni opinius songôn tute kiel vivon kaj neniam ni dubus, ke tio ne estas efektiva vivo.

Nun tuta nia vivo, de l' naskiĝo ĝis la morto, kun siaj songôj, ĉu ĝi ne estas siaflanke songô, kiun ni opinias reala vivo kaj kies realecon ni ne dubas, nur ĉar ni ne konas alian vivon pli realan? Mi ne nur tiel opinias, mi estas konvinkita, ke tiel ĝi estas.

Kiel la songôj en tiu ĉi vivo estas statoj, dum kiuj ni vivas per la impresoj, pensoj kaj sentoj de la antaŭa vivo, tiel same nuna nia vivo estas stato, dum kiu ni vivas per tiuj de la „Karma“, antaŭirinta la pli realan vivon, kaj dum kiu ni nin provizas per fortoj, ni ellaboras „Karma“n por la sekvonta, pli reala vivo, el kiu ni eliris. Kiel ni travivas milojn da songôj en tiu ĉi nia vivo, tiel same tiu ĉi nia vivo estas unu el miloj da tiaj vivoj, kiujn ni eniras el tiu vivo pli reala, efektiva, vera, el kiu ni eliris, enirante nunan vivon, kaj kien ni revenos mortante. Nia vivo estas unu el songôj de tia, pli vera vivo, kaj tiel plu, ĝis senfino, ĝis unu lasta, vera vivo vivo de Dio. Naskiĝo — kaj apero de unuaj perceptoj pri la mondo — estas endormiĝo kaj la plej dolĉa songô; morto estas vekiĝo.

Frua morto estas, kiam oni iun vekis, sed li ne satdormis. Maljunula morto — li satdormis, sed estis dormanta jam ne profunde kaj vekiĝis mem. Memmortigo estas inkubsongô, kiun oni ĉesigas rememorante, ke oni dormas, farante penon kaj vekiĝante. Homo, kiu vivas de nura tiu ĉi vivo, kiu ne antaŭsentas alian vivon, tio estas — profunda dormo sen songôj — duonbesta stato. Senti dum la dormo tion, kio okazas ĉirkaŭ ni, dormi akrasente, esti preta ĉiumomente ekvekiĝi: tio estas kompreni almenaŭ neklare tiun alian vivon, el kiu ni eliris kaj en kiun ni iros.

En la dormo oni estas ĉiam egoisto kaj vivas sola, sen partopreno de aliaj, sen interligo kun ili. En tiu ĉi vivo, kiun ni nomas realeco, estas jam pli da interligo kun aliaj, estas jam io similanta la amon al proksimulo. Kaj en tiu vivo, el kiu ni eliris kaj en kiun ni iros, tiu interligo estas ankoraŭ pli forta, la amo estas ne nur io dezirata, sed jam efektiva. En tiu vivo, por kiu ankaŭ tiu ĉi vivo estas songô, la interligo kaj la amo estas ankoraŭ pli grandaj kaj, en tiu ĉi songô ni jam sentas, kio, eble estos tie. La fundamento de ĉio jam estas en ni kaj trapenetras ĉiujn songôjn.

Mi dezirus, ke vi min komprenu; mi ne amuzas min, mi ne elpensas: mi kredas tion ĉi, mi vidas sendube, mi scias, ke, mortante mi estos ĝoja, ke mi aliros al tiu pli reala mondo.

El la rusa: P. MEDEM

* „Karma“ estas budhista doktrino pri repago: interligita kun la doktrino pri transmigrado de animoj. Ĉiu vivanta aĵo estas rezultato de tuta vico de transformadoj. Ju pli virta estis nia vivo en la estinteco, des pli ni alproksimiĝas al la morala perfekteco en la estanteco kaj estonteco. Budho mem ĝis sia naskiĝo travivis 550 tiajn transformojn. La doktrino pri „Karma“ estas forte ligita kun la doktrino de nuntempaj naturalistoj pri la heredeco, laŭ kiu ĉiu homo estas rezultato de virtoj kaj malvirtoj de siaj prauloj, kaj siavice influas plej senpere sian posteularon. Ĉi tio estas ankaŭ speco de „Karma“, t. e. leĝo pri repago. Ĉe budhistoj tiu ĉi doktrino estis nur vestita en pli poezia formo. La homo povis iom post iom plialtiĝi per virteco ĝis la di-simila stato, ĝis feliĉego, kaj kontraŭe, per malvirteco malsupreniri ĝis stato de besto, kaj esti ĵetita en la inferon. La homa animo estas senmorta: mortante, ĝi ĉiam reviviĝas, kaj la ekstera formo, en kiu ĝi vestiĝas, prezentas nur transiran ŝtupon direkte al feliĉego aŭ, kontraŭe, al eternaj turmentoj.



KÉZDI-KOVÁCS: FREŜA NEĜO (Repr. kun permeso de „Könyves Kálmán")

# MIREPOKO

FRIEDEBERT TUGLAS

I

Tiu ĉi parto de l' arĥipelago estis kvieta. La maro estis plena de rifoj, la markoloj inter la insuloj malprofundaj. Grandaj ŝipoj malofte erarvenis ĉi tien.

La loĝantaro vivis trankvilan kaj laboreman vivon. La viroj fiŝkaptis, paŝtis la brutarojn kaj kulturis la vinberkampojn. La virinoj sidis malantaŭ la ŝpiniloj aŭ klakigis la teksilojn.

Aŭtune alvenadis komercistoj kaj alportis feron, ornamaĵojn kaj novaĵojn el la vasta mondo. En la korto de l' insulestro oni tiam foiris dum pluraj tagoj. La fremduloj ŝanĝis la komercaĵojn kontraŭ vinbareletoj kaj retsakoj kun lano kaj revelis al la kontinento.

Dum la maturiĝo de l' unuaj vinberoj la insulanoj festis ĉiujare rikoltfeston.

Tage la gejunuloj vizitis domon post domo, portante vinberarojn kaj glorkantante al la ĝojiganto de ĉiuj. Vespere la viroj sidis longan tempon antaŭ la pordegoj, parolante pri la tempoj pasintaj, dum el la olivboskoj aŭdiĝis danco kaj muziko kiel dum la tagoj de Daphnis kaj Chloë.

Ĉar la loĝantoj de l' insulo estis ankoraŭ konservintaj multajn idolanajn morojn. La estanteco de ili estis interplektita kun la pasinteco.

Jam iliaj prapatroj trovis en la valo marmoran statuon. kiu prezentis dormantan viron kaj virinon kun torĉo, kliniĝantan super li. De tiam ili kultis la verkon kiel dipatrinon, kiu funebras la filon.

Tio estis popolo tro vivĝoja, por eĉ la morton vidi malĝoja.

Ili estis bonvolemaj kaj humilaj. Kiam la insulestro prenis la plej bonajn fiŝakvojn al si aŭ ne donis kalkulraporton pri la preĝeja kaso, tiam ili konsentis pri tio. Iuj paŝtistoj aŭ salajruloj grumblis al si mem, sed ĝis vortoj la afero ne venis.

Ĝi estis ja popolo kutimiĝinta al la ĉirkaŭanta vivo kaj ne povanta eĉ imagi pli bonan.

Tiun jaron estis tre severa vintro. Dum tutaj semajnoj malvarma pluvo frapadis al la rokoj, la maro plaŭdegis minace kaj kruela vento balais la insulon.

La insulanoj sidadis en la kabanoj apud la fajroj kaj manlaboris. La tutan jaron neniu fremdulo venis al iliaj bordoj kaj el ili ankaŭ neniu sukcesis preterveturi la ekstremajn rifojn. Eĉ najbaro malofte vizitis najbaron.

Sed fine alvenis la printempaj tagoj. La sunlumo estis blindige hela. La kretbordoj de l' ekstremaj insuloj helblankiĝis en la daŭro de kelke da tagoj. Sukriĉa herbo kreskis okulvideble.

Milda vento karesis la branĉojn de l' arĝentsaliko kiel harojn de knabino. Ĝi venis el oriento, venis el okcidento, sin turnis al sudokcidento, ĉesis por tagoj. La ĉielarkaĵo ardis blusilke super la helanta maro.

Kiam la paŝtisto Nikias levis sur la paŝtejo la vizaĝon, li vidis unu ĉielon etendiĝantan post alia. En la juna koro plene de malgajo li rigardis la vastaĵojn, kiuj kreskis unu el la alia kiel florburĝonoj el florburĝonoj.

Ha, ĝi estis tiel profunda, tiel malproksima, tiel senlima! Kaj Nikias sentis sin tiel sola kaj forlasita.


Sed turninte la okulojn malsupren, li vidis la teron kaj maron en la helo de la senmova suno. Li vidis la vilaĝon en la valo, vidis la grandan korton de l' insulestro kaj la filinon de l' insulestro paŝantan tra la korto. La manojn sur la randoj de l' korbo tenata sur la kapo, la bruston alte, la krurojn nudaj, tiel ŝi iris al la marbordo kiel reĝidinoj dum tempoj antikvaj.

Ha, nun Nikias sciis, kial li estis tiel malĝoja!

Tie iris kaj rekantis al la maro lia amatino. Kun malpezaj vualoj flirtantaj en la silkmola vento kiel flugiloj: tiel tiu iris, kiun li sopiris, sed neniam esperis atingi.

Ĉar kio estis li, paŝtisto Nikias, por ke li povu eĉ rigardon turni al ŝi. La bastono kaj ŝalmo kaj vila hundo, kiu dancis ĉirkaŭ li persekutante sian voston, estis lia havaĵo.

Kiam dum la vesperoj li iris kun la brutaro tra la vilaĝo, haltis antaŭ la korto de l' insulestro kaj ĵetis rigardon trans la ŝtonbarilon, la insulestra filino fiere sin deturnis. Kaj kiam li faris tion duafoje, la insulestro venis mem kaj kriis kontraŭ li, ronde svingante sian tuberan bastonon.



FRANCISKO MÁRTON: SIKULAJ FRAULOJ

Ha, nun Nikias sciis, kial li estis tiel malĝoja! Kaj li deturnis la vizaĝon de la vilaĝo kaj rigardis la landojn, kiuj si etendis malsupre.

La vinberejoj nigris ankoraŭ kiel ŝtuparoj sur la montdeklivoj. Junaj branĉoj eligis idojn, idoj foliojn, — vinberoj leviĝis de l' tero al la suno.

La montdeklivon supreniris kvin homoj. Sur iliaj ŝultroj estis grandaj plektitaj korboj kun nigra humo, kiun ili portis al la vinberejo de l' insulestro.

Tio estis la malfeliĉa Koras kun siaj edzino kaj gefiloj. Iliaj dorsoj estis kurbaj, la manoj plenaj de kaloj kaj la piedoj sangaj. Apenaŭ moviĝetis pensero en la griza senhara kapo de Koras, kiam li tiel iris antaŭ sia familio.

„Ĝi estis mia kampo, de kie mi venas", li meditis. „Ĝi estis mia kampo, kien mi iras", li remeditis; „ĝi estas mia humo, kiun mi portas."

„Nun mi havas nenion", li meditis post kelka tempo. Kaj li rememoris la tagojn de l' junaĝo, kiam li estis edziĝinta, kiam la familio estis pligrandiĝinta, kiam ilin estis trafintaj malsanoj kaj akcidentoj. Tiam li estis farinta ŝuldojn, ĝis la insulestro forprenis ĉion.

Li devis doni siajn kampojn kaj forlasi la domon. Kiel taglaboristo li devis labori sur siaj antaŭaj kampoj. En fremdula ĉambrangulo eduki la idojn — je sklavoj kiel li mem.

Kaj Koras ekĝemis.

„Tio ŝajnis esti tiel aranĝita", li meditis. „La mondo ne povis resti alie ol tiel. Tio estis ordo kaj justeco sub la lazura ĉielo. Ne estas donita feliĉo al ĉiu!" li ĝemis, levetante la korbon sur la maljunaj ŝultroj.

Car eĉ tiuj ne ricevis pli bonan vivon, kiuj estis serĉintaj ĝin en aliaj landoj, post la insuloj kaj maroj. Estas riĉeco kaj malriĉeco ĉie, kien povas iri la mallongaj piedoj de l' homo.

Kaj Koras vidis, kiel malsupre, en la insulestra boathaveno, Kleon, maristo kaj migrulo, riparis boaton. Liaj rezinkovritaj vestoj brilis kiel felo de lutro, lia hakilo leviĝadis kaj malleviĝadis dehakante splitojn.

Tiu ĉi viro estis ja vidinta la mondon, sed ĉi tien li ĉiam revenadis.

Nun li sidis rajde sur la renversita boato, enbuŝigis tabakon, rigardis jen al la maro, jen al tero kaj kraĉis larĝarke.

— Agrabla estus la vivo, — li diris al la helpanto — se ne ekzistus riĉuloj. La mondo estas bona, sed ne por ni. Ni kuras post pano, aliajn pano postkuras. Por la ceteraj estas oro, por ni tero. Tiel, tiel, junuleto!

Kaj li kraĉis ree.

Tiam li ekrakontis pri la landoj, kiujn li estis vizitanta kaj pri kiuj aŭdinta. La mondo estis stranga! Sed en unu rilato ĝi estis egala: malriĉulo laboris kaj riĉulo rigardis senokupe. Rikoltis tiu, kiu ne semis, kaj en lankusenoj dormis tiu, kiu ne estis tondinta la ŝafojn.

Per la kurba dikfingro li faris rondon direkte al la tero kaj maro.

— Al kiu apartenas la kampoj? — li demandis. — Ĉu al tiu, kiu postas la humon kaj plantas la vinberujojn? Al kiu apartenas la fiŝoj en la maro? Ja al tiu, kiu akiras ilin per la fiŝreto? Sed ĝi ne estas tiel — li respondis. — Ankaŭ ni vidas la maron kaj teron, sed ne havas ni vinberĝardenojn kaj fiŝkaptejojn. Ni ruladas aliulajn barelojn, ni riparas fremdajn boatojn: jen nia tasko. Tiel, tiel, junuleto!

Kaj liaj okuloj, plenaj de ironio, trafis preterpase Korason, kliniĝinte suprenirantan la montdeklivon, kaj haltis sur la monto, kie staris Nikias en la ĉiela heleco, sin apogante al la bastono, dum la hundo dancis ĉirkaŭ li persekutante sian voston.

## II

Estis posttagmeza tempo kaj la suno proksima al subiro. La aero estis senmova kaj plena kvazaŭ de ora polvo.

Tiam okazis antaŭ la okuloj de Nikias, Koras kaj Kleon io eksterordinara en la ĉielo.

La vastaĵo super la maro estis nerimarkite plumbegriziĝinta. La peza kupolo estis pendiĝinta super la akvaro. Kaj en tiu ĉi grizaĵo estiĝis vertikale kaj oblikve teruraj strioj.

Nikias, Koras kaj Kleon sentis, kvazaŭ de tie, el la senlima malproksimo, ondo de malvarmo venus balanciĝante al ili.

Ĉiam pli kaj pli da oblikva lumo aperis en la ĉielo. Ĝi moviĝis kiel teksaĵfadenoj sur la teksilo, supren kaj malsupren, dekstren kaj maldekstren. Tiam ekblovis kvazaŭ vento, kaj ĉio malaperis.

Antaŭ la admirantaj rigardantoj leviĝis vicoj da grandegaj domoj kun neĝkovritaj tegmentoj apud neĝplenaj stratoj. Neĝeris malrapide, poste la neĝado ĉesis. La plumbokolora ĉielo apenaŭ plilumiĝis pro la neĝo.

Dume jam unuj kaj aliaj en la vilaĝo estis venintaj sur la straton, levintaj la okulojn al la ĉielo, poste ektimiĝinte vokintaj kaj svingintaj la manojn. Pro la kriado elkuradis novaj kaj novaj grupoj.

Subite aperis granda urbo kun senlimaj strataroj, palacoj, temploj, pontoj kaj turoj.

Ĝi leviĝis, terura kaj granda, kaŝante la ĉielon kaj maron, — la turoj estis kiel surfalontaj al la vilaĝo!

Nikias, Koras kaj Kleon ekkuris, la unua kun bastono en la mano, la dua kun renversita korbo sur la kapo, la tria kun hakilo sur la ŝultro. Kleon kuregis kiel lutro sur la splitplena bordo, la hundo saltadis bojante ĉirkaŭ Nikias. Poste ĝi subite interpiedigis la voston kaj komencis bojĝemi.

La kurantoj miksiĝis en la popolamason sur la vilaĝa strato. Tie ĉi sin trovis viroj, virinoj kaj infanoj.

La vizaĝo de potisto estis ŝmirita per argilo, la manoj de bakisto per pasto kaj la forĝisto tenis ankoraŭ ruĝan feron per la prenilo. En la pordo de la barbiro staris viro, kun duone senharigita kapo trans lian ŝultron rigardis la majstro, ankoraŭ instinkte klakante per la tondilo.

La virinoj kunmetis la manplatojn, tenante suĉinfanojn sur la brakoj. Blindaj maljunulinoj movadis la sendentajn buŝojn, kun stultaj vizaĝoj turnitaj al la ĉielo. Infanoj kuradis tien kaj reen, kiel en foiro.

Sed ĉiam pli stranga kaj pli terura fariĝis la ĉielo. La vidaĵo disvolviĝis kiel teksaĵo.

Videbliĝis stratego kun senmezura perspektivo. Eksvarmis homoj, komence kiel apenaŭ distingebla fajlaĵo, ĝis fine la konturoj klariĝis: ruliĝis veturiloj, galopis rajdantoj, rapidis zigzage piedirantoj.

La ponton transveturis kaleŝoj kvazaŭ tutaj domoj kun brilantaj vitromuroj. La kirasoj de

l' kavalerianoj brilegis, la kasktufoj el ĉevalharoj svingiĝis super la kapoj. Kaj la figuroj de unuopaj homoj fariĝis pli kaj pli klaraj, — ili kvazaŭ dancis trans la vitrecan vastaĵon. Kio ĝi estis? Kaj kie ĝi estis?

Ĉiam pli tumulta fariĝis la sceno. Kvazaŭ blovego de vento estus balainta la amasojn. Homogrupoj kunfandiĝis, kaleŝoj veturegis amase, — sed tiam ĉio reklariĝis.

Subite unuopa nigra viro kuris tra la popolamaso, svingante la maldikajn manojn, kun buŝo malfermita. Fariĝis malordo, la homoj ekiris pli rapide.

Tiam la popolamasoj ekposteniĝis, kaj sur la konveksa ponto proksimiĝis areto da homoj. Tio estis plejparte ĉifonvestitaj virinoj, kun terkoloraj vizaĝoj, ekstreme malgrasaj, portantaj sur la brakoj aŭ trenantaj tiajn samaspektajn infanojn.

Ili paŝis malrapide kaj peze. Multaj el ili postrestis kaj novaj aliĝadis. La ponto ŝajnis fleksiĝi sub la malfortaj piedoj de tiu ĉi malalta kaj kurbiĝinta grupo.

La lasta homo en la vilaĝo estis kurinta al la strato. Ili silentis, retenante la spiradon, kun buŝoj malfermitaj kaj manoj tremantaj kiel en febro. Ilin estis ekreginta nekomprenebla teruro.

Subite antaŭeniĝis, tra la popolo, plenigante la straton, aro da kavalerianoj kun levitaj lancoj. Ili galopis en la proksimiĝantan virinaron, subpiedigante ĝin, pikante per la lancoj kaj hakante per la glavoj.

Tio influis tiel neatendite la insulanojn, ke la virinoj komencis kriegi, ekkaptis per la manoj la kapojn kaj kuris en la domojn, por reaperi post momento en la pordoj.

Tiu ĉi tumulto daŭris nur minuton, tiam ĉiuj disiris, sed sur la neĝo nigris tie ĉi kaj tie sangmakuloj kaj kuŝis iu infano, malforte movanta la membrojn kiel vundita cikado. Unuopa virino kuris tordante la manojn de unu infankadavro al alia, ne trovante la sian.

Subite leviĝis malantaŭ la ponto sennombraj popolamasoj, rapide proksimiĝante. Super iliaj kapoj baraktis en la malforta vento standardoj, la vizaĝoj kunfandiĝis je unusola nigra makulo, la manoj leviĝis kiel arbobranĉoj.

Denove la kavalerianoj galopis antaŭen, ilia flugilo entranĉis la popolamason, sed post momento ĝi estis dispecigita kiel papera birdo. Ĉevaloj sen rajdantoj kuris trans la ponton, kavalerianoj sen ĉevaloj falis trans la balustradon kiel nigraj ŝtipoj.

Tiam ĉio intermiksiĝis en unu kapturna tumulto: tabulbariloj rompiĝis kvazaŭ kartonaj, veturiloj renversiĝis kiel ludiloj, homoj faladis kvazaŭ kuloj. Sed ili alvenis senĉese, senĉese sur la senlimaj stratoj!

Tiam penetris aro da infanterianoj kun bajonetoj antaŭen, pafiloj alvangiĝis, malgrandaj fumstrioj leviĝis supren, — la popolamaso diskuris kiel forbalaita, dum agonie ĵetiĝantaj korpoj solaj restis sur la neĝo.

La insulanoj levis la manojn kaj ekkriis pro terurego. Ili diskuris kiel ŝafaro, sed baldaŭ retrovis sin kune observantaj la ĉielbordon.

Nun disvolviĝis antaŭ ili bildoj, unu pli terura ol la alia.

La tumulto havis jam nenian formon, nek limon. Ne distingiĝis plu unuopaj el homo, nek unuopa homo el la amaso. Ĉio moviĝis kiel nigraj kaj grizaj makuloj, kiujn de tempo al tempo kaŝis nuboj de fumo kaj neĝo.

La popolamaso ĵetiĝis kiel ĉifono de unu stratflanko al la alia, tien kaj reen. Tio estis kvazaŭ senĉesa ondado de nigraŝaŭma maro. Kaj super ĉio mortsilento!

Tiam leviĝis depost la domoj karbenigraj nuboj. Densa fumo penetris sur la straton, disfluis super la tero, mortvundito movis la manojn kaj piedojn en la nuboj de haladzo.

La observantoj kvazaŭ sufokiĝis antaŭ tiu ĉi bildo, metinte la manojn al la kapoj kaj mallaŭte ĝemante. Kaj ili vere ĝojis, kiam super la konstruaĵoj vidiĝis ondantaj flamoj, koloritaj kaj malvarmaj.

Sed ĉiam pli kaj pli terura iĝis la tumulto. Tio estis tutaj armeoj, kiuj nun pafadis reciproke. Homgrupo dispeciĝis kiel inter feraj rulegoj. Ia giganto disrompis per feraj manoj la domojn, homojn kaj arbojn.

La neĝo nigris pro la sango, kadavroj kuŝis senorde sur la bazaro, vunditaj ĉevaloj baraktis, la piedojn supre, — ĝis ia nevidebla forto forbalais la renversitajn veturilojn kaj kadavrojn kaj sur la bildo disvastiĝis malhela ombro.

Sed baldaŭ ekvidiĝis malantaŭ ĝi sennombraj popolamasoj, marŝantaj rekte kaj fiere, dum centoj da standardoj ondadis super la kapoj. La fabela procesio larĝiĝis kaj longiĝis ĝis senfineco.

La stratoj leviĝis kiel bretoj unu super la alian, la procesio zigzagis kiel serpento, la standardoj disvastiĝis kiel nuboj, – en la tuta ĉielo ondis la kreskantaj vicoj de homoj, marŝantaj peze kiel bronzaj gigantoj kaj malpeze kiel nebulaj vizioj.

Tiam ĉio komencis malaperi, vualo sterniĝis antaŭ la vastaĵo, malrapide neĝeris, ankoraŭ, sed tiam la nuboj fariĝis palgrizaj kiel fumo, ĝis ree ekvidiĝis la stankolora ĉielo super la maro kaj insuloj.

La suno estis malaltiĝinta.

Tra la cindrokolora nubo penetris ruĝa brilo, disvastiĝanta sur la akvosupraĵo kiel sanga glavo. Tio estis malvarme-hela lumo, kiu vibris nigre kaj sangokolore, miksiĝante en la akvon kaj teron, fandante en si ĉion.

III

La homoj staris kiel ebriaj. Tiam komenciĝis murmurado, kiu plilaŭtiĝis ĝis kriado. Poste ĝi silentis momenton, por denove fariĝi same laŭta.

Nikias staris senmove, rigardante per la larĝe malfermitaj okuloj al la ĉielo. Li vidis tie ankoraŭ kavalerianojn galopantajn kaj standardojn flirtantajn. Tiam li viŝis per la maniko la frunton, sed la vizio ardis ĉirkaŭ kaj en li.

Koras frotis la okulojn, volante vekiĝi, sed li vidis la aliajn ĉirkaŭ si same skuitaj kaj li ne komprenis, kio estis efektive okazinta. Ĉiam ankoraŭ li vidis la senkarnajn manojn kaj la kliniĝe rapidantajn mizerajn virinojn.

Nur Kleon ridetis ironie. Li batadis per la manoj kun elstarantaj vejnoj al la leda antaŭtuko kaj kraĉis kvazaŭ konfirmante la malofte diritajn vortojn.

— Se ne fleksiĝas, do rompiĝas — li murmuris al si mem. — Kiu ne submetiĝas, tiu surleviĝas — li ripetis. — Oni batu pli forte, por ke venu deziro kontraŭbati. Pli forte, pli forte! — li kriis al la popolo.

Subite la vetero fariĝis ventega. La maro ŝaŭmis ruĝe kaj la suno falis en la nordokcidento kiel pokalo da sango. Vento ŝiradis la mizerajn tegmentojn kaj la malelegantajn ĉifonojn de la homoj. La vizaĝoj de la virinoj estis bluaj kaj la viroj staris kolere, kun pugnoj en la poŝoj.

— Al ĉiuj ne sufiĉas eĉ propra morto, — diris Kleon — tiom pli malmulte la vivo. La ĉielo ne apartenas al ĉiuj, — li murmuris — sed ankoraŭ pli malmulte la tero. Kaj kiel povus tiu leviĝi en la lasta tago, — li remokis — kiu en la antaŭlastaj tagoj neniam estis leviĝinta.

Tion dirinte li surŝultrigis la hakilon kaj ekiris fajfante. Li direktis sin al la boathaveno de l'insulestro.

La viroj postrigardis lin. Ili ekvidis la belan domon, la bonajn fiŝakvojn kaj la nigrajn kampojn de l' insulestro. Kaj tiam ili ekvidis la insulestron mem starantan en la pordego kaj kolere rigardantan la virojn.

Koras tiris rapide la korbon pli profunden sur la kapo kaj rapide ekiris.

Sed iom malproksimiĝinte, li diris al siaj malgrasa edzino kaj malsanemaj gefiloj: „Estas maljuste, ke ni kulturu nian kampon por fremdulo...“



Kliŝaĵo „Pantheon“

Pli multe li ne pensis tiufoje.

Nikias staris ankoraŭ momenton, sed tiam li iris rapide persekuti la diskurintajn brutojn, kun humoro ankoraŭ pli distrita. Subite ĉio antaŭa ekŝajnis al li malproksima, persona zorgo ne plu ekzistis, nur la grandajn standardojn li vidis ankoraŭ flirtantaj.

La venta mallumo venis baldaŭ, sed neniu en la vilaĝo volis dormi.

La viroj turnadis sin sendorme de unu flanko al la alia, tiam ili leviĝis kaj iris al Kleon. Tiu sidis en la fiŝejo de l' insulestro en lanterna lumo, gratetis la hundon de Nikias kaj parolis sen levo de l' kapo:

— Tiel, tiel, amiko, plenaj de favoj ni estas ĉiuj kaj hundoj ni estas ĉiuj. Nur ni grumblas pli malmulte, kaj mordas ankoraŭ malpli multe. Homo estas hundo interne, hundo de pli malbona speco. Tiel, tiel, amiko, ci ne komprenas min, sed ĉu ci opinias, ke mi komprenas la homojn?

Tiam li levis subite la kapon kaj demandis abrupte:

— Ĉu vi volas teron? Ĉu vi volas liberon? Ĉu vi malŝatas la servuton?

Kaj la viroj respondis kiel per unu buŝo: „Jes!“

Tiun nokton oni maldormis longan tempon kune, parolis flustre. Koras eksopiris balancante la kapon, Nikias svingadis la manojn, kun vangoj febraj, sed Koras ekscitis ĉiujn per sarkasmo. Hejmen oni iris ŝtele, kaŝante la lanternojn sub la baskoj, kiujn la uragano ŝiradis kaj tiradis.

Matene kolektiĝis grupoj unu post la alia en la korto de l' insulestro.

— Kiu estas lin elektinta insulestro? — oni ekdemandis. Neniu sciis. Lia patro estis tiu estinta, same la avo. Tiam ĉio malaperis en la krepusko de l' tempoj. Sed kion li estis farinta, en tio troviĝis jam nenia krepusko.

Ili postulis vidi la insulestron, kaj tiu venis, maĉante ankoraŭ panon kaj kun miro sur la vizaĝo. „Kion ili volas?" li pridemandis malsevere.

— Li donu kalkulraporton pri la preĝeja havaĵo — oni diris al li. — Li fordonu la monon de l' vidvinoj kaj georfoj. Li ne ekspluatu la kampojn de l' komunumo.

— Ni malsatas — diris Kleon malantaŭ la aliaj.

— Ni volas liberecon! — vokis Nikias antaŭ ĉiuj.

— Liberecon vi povas ricevi tiom kiom vi volas, — la insulestro diris glatigante la barbon — sed ĉiujn rajtojn mi estas heredinta de miaj patro kaj avo.

- Ni konas nek vian patron nek avon! — oni kriis al li. — Ni volas ricevi, kio apartenas al ĉiuj!

Sed jam la insulestro estis malaperinta, kaj en ĉiuj pordoj kaj fenestroj ekaperis pafiltuboj.

La estro estis jam delonge preta por ĉio! La domo estis plena de armitaj dekestroj kaj servistoj!

— Hundo! — kriis Kleon, elkurante. — Mi volas ankaŭ vin grateti!

Sed en tiu momento ektondris la pafiloj, kaj la kadavro de Kleon ruliĝis malsupren de la ŝtuparo. Kaj sammomente iu kriis: „brulas! brulas!" kaj ĉiuj ekvidis ĉe la rando de l' vilaĝo fumkolonon.

Ili kuris tiel rapide kiel ili povis tien kaj trovis brulanta la kabanon de iu farmulo. Sed estis plej mirinde: ili trafis la serviston de l' insulestro kun torĉo, ekbruligantan ankaŭ la najbaran farmobienon kaj ili tuj mortigis lin.

Tiam la armita popolamaso rekuris al la domo de l' insulestro. Ŝtonoj flugis nube kontraŭ la pordojn kaj fenestrojn, ĉion dispeciganta. Sed tuj retondris la pafiloj, kovrante la teron per sango.

Tiel komenciĝis la sanga tumulto, kiu pereiĝis la insulon.

Tio estis sanga ekstazo, kiu plenigis la spiritojn. Tio estis kolerego, postulanta agojn. La viroj enbataliĝis kun hakiloj kaj harpunoj, kaj la virinoj portadis ŝtonojn en la antaŭtuko kiel suĉinfanojn. La vunditojn oni portis flanken sur ŝtupetaroj, senvunduloj kuris tra la mortintoj al batalo.

Kaj en tiu ĉi tumulto neniu rimarkis, kiam unuopa boato remveturis al la maro. La insulestro rifuĝis. Li aŭdis la malproksimiĝantan batalkriadon kaj vidis rerigardante fajrokolonon leviĝantan super sia domo.

Kiam la batalo ĉesis, neniu el ĝiaj iniciatintoj estis sendifekta. Estis malvivaj Nikias, Koras kaj Kleon. La vilaĝo estis plena de kadavroj kaj ruinoj. La virinoj ploris multon da tagoj kiel super unuj tiel super la aliaj.

Kaj neniu komprenis, el kio ĉio ĉi estis ricevinta la komencon. Ĉu tio estis sorĉo, ĉu vizio, ĉu terura sonĝo? La restintoj frotis la okulojn, pridemandis unu la alian, sed ne trovis respondon.

Sed la suno leviĝadis kaj subiradis. La vivado, daŭris kiel antaŭe. Kaj ankaŭ la homoj devis vivi.

Tiu estis malfacila somero. La kampoj estis dezertigitaj, la domoj bruligitaj, mankis laboristoj. La malmola tero ne kreskigis grenon kaj la ventema maro ne eldonis facile fiŝojn.

Kaj aŭtune strangmaniere neniu fremdulo venis al la insulo. La insulanoj ne sciiĝis, kio estis okazinta en la cetera mondo. La sekvintan aŭtunon la venantoj havis jam freŝajn novaĵojn kaj la malnovaj estis forgesitaj. Kaj tiel ĉio restis por la insulanoj nesciata.

Unu fruan printempon la estro boatveturis akompanate de kelke da viroj ree al la insulo. En la komenco li evitis ceterulojn, sed intertempe ĉio ŝajnis esti forgesita. Li dungis geservistojn, rekonstruis la domon, rekomencis preni depagojn, kaj la antaŭa vivo daŭriĝis. Nur lia kaprobarbo tremis pli multe ol antaŭe.

Kiam li estis travivinta sian tempon, lia filo fariĝis insulestro.

Tiu ĉi parto de l'arĥipelago estis kvieta kaj ankaŭ restis tia. La loĝantaro vivis trankvilan, malriĉan kaj laboreman vivon. Estis kreskinta nova generacio, malĝojeta kaj flegmatika. Ĝi estis diskreta, kvazaŭ rememoriganta ion.

Sed dum la maturiĝo de l' unuaj vinberoj la insulanoj festis ankaŭ nun ĉiujare rikoltfeston.

Tage la gejunuloj vizitis domon post domo, portante vinberarojn kaj kantante antikvajn kantojn. Vespere la viroj sidis longan tempon antaŭ la pordegoj, parolante pri la tempoj pasintaj, dum el la olivbosko aŭdiĝis mallaŭta muziko kaj danco.

La parolado de la viroj interrompiĝis kelkfoje per longaj silentoj. Ili levis la vizaĝojn al la malkare lumetanta ĉielo. Ia rememoro turmentis iliajn pensojn, sed ju pli ili disvolvis ĝin, des pli nebula kaj nekredebla ĝi fariĝis.

Kaj ili demandis sin mem:

— Ĉu iam estis okazinta io simila? Ĉu la vivo ne estis ĉiam tia kiel nun? Ĉu tio ne estas sonĝo kaj vizio, terura legendo, kiun niaj patroj rakontis, kiam ni estis ankoraŭ malgrandaj infanoj kaj ludis sur la helkolora marborda sablo?

El la estona: HENRIKO SEPPIK

*

NOTO PRI LA AŬTORO. Friedebert Tuglas (naskiĝis en la jaro 1886) estas konsiderata la plej granda estona moderna verkisto. En nia literaturhistorio ne troviĝas egalulo al li. Lia plej bona kaj plej sukcesinta libro el arta vidpunkto estas novelkolekto „Saatus" 1917 („La sorto"). La jena novelo estas tradukita el la kolekto „Raskuse vaim", eldonita en la jaro 1920 de la eldonejo „Jun-Estonujo".

Tuglas estas novromantikulo kaj simbolisto. — Tre karakteriza trajto de li estas stilkulto, — kio devus esti ekstreme grava ankaŭ por la Esperantaj verkistoj. „En formo elmontriĝas la konsekvenca, logika progreso de l' arto... La materio estas nur fera skeleto... Nur la artformo faras la ŝtalfadenojn de l'abstraktaj ideoj elastaj lianoj", li mem skribas.

Lastatempe Tuglas elmontris grandan intereson ankaŭ por Esperanto. En sia „Literatura taglibro" li skribis sur unu paĝo pri ĝi. Li kredas je la estonteco de Esperanto. *La tradukinto*

# KORPA BELECO

## FREDERIKO KARINTHY

Je la dua tago post mia morto mi ricevis citleteron, ke mi aperu en la kontoro de la Transmonda Ĉiel-kompletiga Komandejo. Oni difinis mian lokon ie, kie kun pluraj aliaj ni atendis, ke oni transportu nin al la Marso, aŭ kien ajn en la kvara dimensio. Mi tre enuis. Je la kvina tago mi renkontis mian amikon Desiderion, por kiu la sama loko estis difinita.

— Kiel vi fartas, — mi demandis — ĉu vi longe restos ĉi tie?

— Mi ne scias. Mi tre enuas. Vi scias, oni malvigliĝas en la transmondo. Ne estas urĝaj aferoj, oni havas tempon por ĉio. La eterneco ja neniam elĉerpiĝas. Ĉu ankaŭ vin oni alcitis ĝis eternecfino?

— Jes. Ĉu ĉi tie estas ĉiam tiel enue?

— Jes kaj oni perdas la tutan bonhumoron. Ekzemple antaŭhieraŭ venis en mian memoron, ke mi havas komision. Ankoraŭ antaŭ mia alcito mi promesis al iu, al sinjorino, ke je la dua tago post mia morto, nokte mi vizitos ŝin. Do, ĉi tio venis en mian memoron, mi pensis, ke mi havas ja nenion por fari, mi malsupreniros, ni interparolos iomete.

— Interese. Nu kaj kion ŝi diris?

— Kelkajn minutojn antaŭ noktmezo mi alvenis, la sinjorina moŝto ankoraŭ dormis. Mi pensis, ke ŝi dormu ja, mi iris tra la muro poste mi sidiĝis en la spegulon kaj mi rigardis ŝin. Laŭ multaj vidpunktoj preferinda estas ĉi tiu stato, ke oni ne havas korpon. La mia estis iom tro dika kaj mi ofte ŝvitis. Tio ne ekzistas ĉi tie.

— Kompreneble, vi estas prava.

— Do, mi estis sufiĉe scivola pri la renkonto. Nome mi skribis al ŝi longan kaj patosan leteron, en kiu mi promesis al ŝi ĉi tiun rendevuon. Mi skribis, ke ni renkontiĝos en la transa mondo.

Desiderio meditis.

— Nun mi ne komprenas, kial mi volis renkonti ŝin ĝuste en la transa mondo. Ŝajne mi havis ion gravan por diri al ŝi, sed, je Dio, mi forgesis ĝin. Mi sidis tie, en ŝia ĉambro, kaj rompis al mi la kapon, kion mi volis do diri al ŝi. Kvankam kiel urĝa estis por mi ĉi tiu renkontiĝo, mi mortpafis min nur por renkonti ŝin. Kaj pensu, mi estas tie, kaj nenio venas en mian kapon.

Denove li meditis.

— Ĉu bela virino? — mi demandis fine?

Desiderio ektiris la ŝultrojn.

— Dio nur scias! Antaŭe ŝi tre plaĉis al mi. Nun mi ririgardis ŝin pli bone, dum ŝi dormis. Diru sincere, ĉu dum via ĉi tiea restado ne venis en vian kapon, kiel stranga afero estas la homa korpo?

— Ĉu stranga?

— Nu, jes. Mi povus diri: komika. Al mi faris strangan efikon tio, ke jen, ĉi tiuj homoj ĉiam ankoraŭ portas la korpon, kiun mi de longe jam ne portas. Ĉi tio estas ia... ia... elmodiĝinta afero... Kiel la vestoj eluzitaj de sinjoroj. La animo demetas la veston kaj ĉi tiuj plu portas ĝin...

— Kaŝas sin io en la afero. Sed la detaloj...

— Do, aŭskultu, ankaŭ tiujn mi pririgardis. Ekzemple, antaŭe mi estis freneze enamiĝinta

al ŝiaj piedoj. Sed mi petas vin, eh, mi petas vin, kiel aspektas ja tia homa piedo. Ĝi estas evidente kvazaŭ kripliĝinta mano. Antaŭe ĝi ja estis mano, kiam la homo estis simio. La fingroj senformiĝis, la manplato fariĝis dika, senforma karnŝvelaĵo. Mi vere ne komprenas, ke tion mi antaŭe ne rimarkis.

— Kaj ŝia buŝo?

— Ĝi estas du ruĝaj karnkolbasoj. La supra aperturo de la intestsistemo, ŝveliĝinta pro la multa manĝo. Interne estas ostetoj, sed ankaŭ tiuj ne havas regulan formon. Poste la nazo...! Nu, aŭdu! ĉu povas ekzisti io pli senforma, ĝi havas du truojn. Sed plej komikaj, plej mizeraj estas la du oreloj. Ke ĉi tio neniam venis en mian kapon! Du malevoluintaj, plorindaj karnfranĝoj, kiuj ŝrumpis kaj kunfaldiĝis, kvazaŭ rostita lardo. Kaj du tiaj franĝoj pendas ĉe la du flankoj de la kapo, kaj ili plaĉis al mi! kaj mi volis kisi ilin! Brrr!



INNOCENT: DIMANĈO POSTTAGMEZE

— Strange, strange. Estas io prava en via parolo.

— Kaj mi rigardis ŝin iom da tempo. Same tia estas la tuta. Poste denove mi rompis al mi la kapon, kial mi volis renkonti ŝin. Poste, ĉu honte, ĉu ne honte, mi ne povis rememori, do mi kaptis min, kaj bele, silente mi forportis min antaŭ ol ŝi vekiĝis.

— Mi ne reirus plu eĉ se oni promesus al mi... mi ne scias, kion.

— De tiam vi tute ne rememoris ŝin?

— Kion fari? Ne! Sed mi tute ne streĉas min, mi havas ja tempon. Por tio estas ja la eterneco. Ĉu vi ne havas cigaredon?

— Mi havas, sed kiel fumi, se ni ne havas buŝon?

— Vere. Vidu, jen la sola afero, kiun mi bedaŭras.

## LA TAGO DE L'VIVO

Matene en la frua hor'
La birdoj kantis al la ĉiel',
La valo brilis per la flor',
La papili', la kokcinel'
Aldonis iom da kolor',
Kaj ĉio ŝajnis esti bel'.

Sed kiam venis la vesper',
Ŝanĝiĝis multe tiu scen';
Ne plu troviĝis la aer'
Kiu freŝigis en maten';
Sensuna restis nun la ter',
Anstataŭ ĝojo, jen ĉagren'.

Tiele en la vivo mem:
Alvenas frue ĝia glor';
La jaroj pasas sen problem',
Sen la kompreno al dolor'
Ĝis kun la sperto venas ĝem',
Ĝis nia juno estas for.

FRANCIS ALBINO

# RENKONTO AL LA LUNO

— 1918 —

Vespere, en la val'
Sur kampo de batal'
Mi amblis sur ĉeval'
Kaj post mi la dolor'...
Kaj en la malproksim'
Milit': la sanga krim'
Bruadis kaj per tim'
Frapadis sur la kor'...
Nun ruĝaj lumogarboj
Filtriĝis tra la arboj,
Kaj jen, per unu foj',
Ĉe la turniĝ' de voj'
Ekvidis la okuloj
Sub nuboj, en ruĝbruloj
Mem la gigantan lunon,
La leviĝantan lunon.

Sur horizont' vapora
Kun stranga vang' dolora
Al rand' de l' ter' tuŝante,
Sin vane forpuŝante,
Pro forta, vana peno
Taŭzite je l' mieno,
Turmente, sangobrile
Jam preskaŭ ovsimile
Baraktis jen la lun',
Ke haltis mi subite
Mirante kaj frapite,
Min tuŝis sent' kompata
Pri lun' la turmentata,
Mi kriis al ĝi nun:

Ho luno, komprenas
Mi vian suferon,
Perforto vin ĉenas
Premante sur teron,
Sur teron de l' ĝemoj,
De l' grinco de dentoj,
De ploro, korpremoj,
Barakto, turmentoj...
Ho, bela la tero!
Por ĝu' sin preparis,
Sed val' de l' mizero
La homoj ĝin faris.
Jen brila naturo
Nin ĝui instigas,
Rivera susuro
Dorlote dormigas.
Jen, kampo silkhara
Allogas por kuŝi
Kaj ĥoro birdara
Nin volas kortuŝi.
Jen, floroj odoras
En pompa ornamo
Kaj ĉio sonoras
La psalmon de l' amo.
Jen, ĉie vivĝermoj,
Mistera sorĉzumo,
Al vivo eĉ vermoj
Ja ĝojas en humo.
Ĝojsonoj, aromoj
La vivon eklaŭdas...
Ho, ĝin nur la homoj —
La homoj ne aŭdas.
Hom'! fonto de honto!
Kreskaĵo venena!
Li kreskis en mondo
Por vivo malbena.
Al murda pasio
Diablo lin puŝis,
La kreon de Dio
Mizere li fuŝis!
Jen, iras kun rampo
Por murdi soldatoj,
Vundiĝas la kampo
Per frap' de grenadoj.
Riveran lulzumon
Subpremas stertoro,
Printempan parfumon
La sangoodoro.
Vizaĝ' de junuloj
En sango sin banas,
En vitraj okuloj
La morto rikanas.
Esperoj junaĝaj
Jen kuŝas en polvo,
La cerboj kuraĝaj:
Frandaĵoj por korvo.
Malama lavango
Detruas ebrie;
Ho sango, kaj sango,
Kaj sango nur, ĉie.
Per sanga vaporo
Haladzas la tero,

Venenas odoro
De l' teratmosfero,
Sur ter' sangaera,
Pro l' sangabomeno,
Vi, lun' malespera,
Baraktas en sveno.
Vi ĝoje festenis
En alto etera
Ho, kial vi venis
Al tero sufera?
Nun pro la doloro
Vi tremas kaj ĝemas,
La sanga vaporo
Sufoke vin premas.
Droninte vi svenas
Premite sur teron...
Ho luno, komprenas
Mi vian suferon.

Sed la ĉeval' plu paŝis,
La lunon arboj kaŝis,
Nur ruĝo dubeluma
Filtriĝis tra la zuma
Folia tend'...
Dolor' la koron boris
Kaj rosolarmojn ploris
La firmament'.
En solo, sen konsolo
Kaj kun sveninta volo
Mi lasis porti min... .
Sed kiam al la fin'
De la arbar' mi venis,
Vidaĵo nova min katenis:

Jen, sin de l' ter' puŝinte, nun
Jam brilis super ter' la lun',
Sukcesis per savanta salt'
Al ĝi atingi ĝis la alt',
Plenvange brilis kaj rikane
Kaj — ridis ĝi pri l'ter profane...
Ho, estis tia mokridaĉ'
Sur ĝia flava rondvizaĝ'.
Ke mia homa digno
Ribelis kun indigno
Kaj kriis mi per voĉ',
De plenda riproĉ':


Ha, kion mi vidas?...
Ho luno! Sen sento,
Cinike vi ridas
Pri l' tera turmento!
Vin savis, vin banas
Vi en la etero
Kaj nun vi rikanas
Pri nia sufero.
Ha, kiel incitas
Min rido plenvanga,
Ĉu ridon meritas
Turmento la sanga?
La tuta homgento
En spasmoj sin tordas,
Terura serpento,
Malamo ĝin mordas —
Volvante ĝi ringis
Sin ĉirkaŭ la teron,
Ho ve, ĝi estingis
La dian fajreron.
Ho, homo plorinda,
Ho, krono de l' kreo,
Jen kuras li, blinda,
Al propra pereo.
Li amon, la flamon
Ĉielan subpremas,
Kaj ĉie malamon,
Draksemon li semas.
Al fremda havaĵo
Avide li strabas,
Perfidas en kaŝo
Kaj murdas, kaj rabas.
Kaj ĝoj' lia trema
Ĉe l' cel' elluktita:
Jen: sonĝo pasema
Sur sablo luktŝvita...
Je varm' li sopiras
Dentklake, kun ploro
Per frosto alspiras
Lin propra la koro.
Kaj post la dispremo,
Perfido, perforto
Defalas kun tremo
Li antaŭ la morto.

Se havas vi senton,
Ne ridu, ho luno,
Priploru l' homgenton
Sub sarĝo de l' puno.
Mi estas homfrato
Kun sentoj doloraj,
Kun sanga kompato
Al fratoj senkoraj,
En ili ja vivas

Sub cindroj la flamo,
Mem ili soifas
Je vero kaj amo.
Sed ilin, ve ligis
Fatalo mizera,
Animojn subigis
Per sorĉo infera.
Vin vokus, Savanto!
Anime ravanto
Kaj krimdelavanto
La krioj suferaj.
Sed fortoj eteraj
Al homoj surteraj
Nur indiferente
Rigardas, sensente.
Eterne vivantoj
Nur mokas kun rido
Pri l' vanto de l'vantoj
Pri l' homa avido —
Ĉu preĝon meritas
Ilia perfido?...
Ha, kiel incitas
Min lun', via rido!
Ho kiel ridaĉas
Vi mian homgenton,
Sanglipe dum maĉas
Mi mian turmenton,
Sed vian alkraĉas
Mi impertinenton,
Ho lun', vagabondo
Fripona de l' mondo!...
El val' de l' malĝojo
Sufero, ĉagreno
Vin sekvu sur vojo
Flagranta malbeno!...

Jen la renkonto stranga al la lun'.
Mi ploris tiam. Kaj vi — ridu nun.

K. de KALOCSAY



# LI DONAS AL MI TEMON

FREDERIKO KARINTHY

Tiu sinjoro, kiu nun sidas ĉe mia tablo, antaŭ kvin minutoj sidiĝis tie, kaj diris:

— Espereble mi ne ĝenas vin.

— Ho, tute ne! mi kriis, kaj kliniĝinte super la malplenan paperon mi skribis supre la numeron „kvin“, kvazaŭ mi skribus jam la kvinan folion. Mi skribis rapide la vortojn: „kaj sekve de tio“.

— Sed kiel mi vidas, vi laboras.

— Jen, jen — mi diris. — Vere. Mi eĉ ne rimarkus, se vi ne atentigus min pri tio.

— Nu, do mi ne ĝenos vin plu. Kion vi verkas?

— Ho, nenion. Vere malgravan aferon. E... etan teatraĵon. Etan filozofian fakverkon, pri la soleco. Mi volas ekspliki, ke por la laboro oni nepre bezonas solecon, ĉu vi komprenas?

— He-he-he! Jen tiuj ĵurnalistoj! Nu, do mi ne ĝenas vin plu. Ĉu ĝi estos longa?

— Tute ne!... Nur tute mallonga, eta skribaĵo.

— Nu, do skribu, skribu, vi, verkisto.

— Do... se vi permesas.

— Nature, ke mi permesas. Sed vi scias... tiu multa, multspeca skribado... mi nenion legas jam de post jaroj... Ne estas inde... Tia homo, kia mi estas... kiu travagis jam dufoje la mondon... tio estas kompleta romano... jes, kara sinjoro... tio estas kompleta romano, volu kredi al mi. Se mi rakontus al vi, kiujn aferojn mi travivis, estas certe, ke vi...

— Pardonon, — mi interrompas lin modeste — ĉu la plumknarado ne embarasas vin en la parolo?

— Tute ne, nur skribu tute trankvile, tio min ne tuŝas. Miaj nervoj, miaj ŝtalaj nervoj eĉ ne rimarkas tiaĵon... He-he-he, juna homo... Ĉar mi certe ne skribos pri la aferoj... jes ja, certe ja! Tion priskribu foje, he, sinjoro verkisto!

— Ho, tre afable...

Li frapas sur mian ŝultron.

— Vidu, mi povus doni al vi temon kaj pri tiu vi povas certe skribi. Ho, kiajn aferojn mi travivis!... se tiujn priskribus verkisto, la homoj dirus pri ili: nu, dirus la homoj, ja oni nur eltrovis ĉi tion. Tion priskribu iu verkisto! He! sinjoro verkisto, ĉi tion priskribu! Nu? Kion vi diras pri ĉi tio?

Li etendas antaŭen sian malsupran lipon, kaj puŝadas supren sian kapon.


SIMAY IMRE : SIMIOJ

— Grandioze! Ccc! Ccc! — mi miregas. Estus vere grandioze! Kial vi ne skribas foje?

Li mansvingas malŝate.

— Eh, vi scias... mi ne bezonas tion, mi ne penadas pri tio. Por kio!? Por ke la eldonistoj ataku min... kaj cetere mian manon tuj kaptas spasmo. Sed mi donos al vi tian temon, foje, ke se vi skribos ĝin, oni ĝin disŝiros pro scivolo, ke vi povos konstruigi domon per tio... ĉar tian oni ne ankoraŭ skribis...!

— Ho, vi tre dankdevigas min — sed vere mi ne kuraĝas forrabi ĝin de vi.

— Eh, mi ne bezonas ĝin. Kion mi faru per ĝi? Nu, foje mi rakontos al vi, kaj poste tion priskribu, sinjoro verkisto, ke kiel mi venis en Amerikon. He?

— Tio povas esti terure interesa!

Li ekfrapas mian bruston per pugno.

— Ĉu interesa? Diru ke: mirakla! Tion diru!

— De...

— Aŭ tion priskribu, kion mi komencis en

Ameriko post kiam mi alvenis. Ke mi ŝovelis neĝon... per ĉi tiuj miaj propraj du manoj... rigardu... ĉu vi kredas? Per ĉi tiuj du manoj... mi ŝovelis neĝon... jen kion vi priskribu!

Li gestegas antaŭ mia nazo. Strangex mi jam vidis pli belajn manojn ŝoveli neĝon. Mi ne komprenas, kial oni ne povus ŝoveli neĝon per ĉi tiuj?

— Grandioze — mi diras.

— Grandioze? tion mi kredas. Se mi rakontos al vi foje, kiel mi ŝovelis la neĝon en New-York... vi ne bezonos plu temon.

Mi vidas min, skribi la sesvoluman romanon pri la neĝŝovelado.

— Nekredeble — mi diras. — Kiaj aferoj okazas al la homo! — mi diras. — Nanu... — mi diras.

Triumfe li rigardas min.

Tion mi kredas! — li diras. — He? Sinjoro verkisto! He? Mi scias doni temon, ĉu ne? Ne estas domaĝe, ke mi alsidiĝis, ĉu ne? Mi scias, ĉu ne?

Vi scias! — mi diras konvinkite kaj mire mi rimarkas, ke li vere donis temon.

## EL MIAJ REMEMOROJ

(Fino)

En Parizo mi pasigis dek jarojn. Dum tiuj dek jaroj mi vivis en vera atmosfero esperantista. Mi estis ĉiam inter esperantistoj, kaj mi parolis ĉiam esperante. Esperanto bone servis min, kaj mi klopodis servi Esperanton. Ĉu mi sukcesis? tion juĝi ne estas mia afero.

„Rememorojn“ skribi el tiu dekjara epoko estus certe malfacile, eĉ sensence. Kiajn rememorojn povus skribi, ekzemple, oficisto, kiu ĉiutage, en sia oficejo, faras sian servon? Tio ja estus tasko neplenumebla. Miaj *personaj* aferoj ja neniun interesus, — ĉu ne vere?... Mi do ĉesigas la daŭrigon de miaj Rememoroj; tamen, por fari plenan laboron, mi raportos en la sekvantaj linioj pri kelkaj okazintaĵoj min koncernantaj rilate al Esperanto.

*

La ĝenerala kunvenado de la parizaj samideanoj okazis tiutempe en la *Sorbonne*. Tiujn kunvenojn la Pariza Grupo Esperantista aranĝis ĉiuvendrede. Tie mi konatiĝis kun multaj famaj esperantistoj, inter kiuj mi sentis min kvazaŭ hejme. La sama Grupo aranĝis ankaŭ, la 12-an de ĉiu monato, komunan vespermanĝon, kie oni vere amike, eĉ familie amuziĝis: oni ne nur „vespermanĝis“, sed distriĝis per seriozaj kaj amuzaj interparoloj, ideoŝanĝoj kaj ludoj. Precipe per ludoj! Oni tiel kore ridis pro la humoraj turnoj de tiuj ĉarmaj ludoj!... Ho, belaj tempoj! kien vi malaperis!...

En la unuaj monatoj de mia estado en Parizo mi konatiĝis kun mia samlandano S-ro V. Polgár, tipografo, kiu tuj fariĝis esperantisto, kaj laboristo en la Presa Esperantista Societo. — Post kelkaj jaroj li aĉetis la presejon, li ankaŭ hodiaŭ estas ĝia posedanto; la Societo restigis al si la eldonejon kaj la librejon.

Unu jaron poste, mi konatiĝis kun lia frato, S-ro J. Polgár, kiu ankaŭ fariĝis esperantisto. Li estas la aŭtoro de la bona esperanta kurslibro por Hungaroj, kiu estas ĉiam tre ŝatata en Budapest.

La unua Universala Kongreso de Esperanto (Boulogne-sur-Mer, 1905) starigis la *Lingvan Komitaton.* Mi havis la grandan honoron esti elektita por ĝi membro; kaj kiam la esperantista *Akademio* estis starigita, je la okazo de ĝia eltutigo oni elektis min ankaŭ akademiano.

S-ro Fruictier kaj Verax, post kelkaj jaroj (mi pensas, en 1907) forlasis la presejon; ilian oficon okupis S-ro Warnier, la patro de nia konata samideano. Li estis bona fakano, sed bedaŭrinde li ne estis esperantisto! Lia estreco ne daŭris longe, ĉar tiam okazis, ke S-ro V. Polgár aĉetis la presejon.

Je tiu okazo „Lingvo Internacia“ eniris en la manojn de S-ro Th. Cart. Li prenis sur sin la redaktadon, kaj, per sia aferamo, talento kaj energio li levis ĝin sur tre altan nivelon. Neesprimebla domaĝo estas, ke la mondmilito devigis ĉesigi ĝian eliradon.

*

Kaj nun, kara leganto, pardonu al mi, se mi iom nemodeste parolos pri mia literatura agado! mi sentas, ke mi *devas* paroli pri ĝi.

Kiel kunlaboranto de „Lingvo Internacia“, mi verkis multajn artikolojn, literaturajn kaj lingvajn. En 1909, mi prenis sur min la redaktadon de „Juna Esperantisto“; tiu ĉi ankaŭ ĉesis kaŭze de la milito. Cetere mi skribis artikolojn ankaŭ por aliaj gazetoj esperantistaj kaj verkis aŭ tradukis ankaŭ memstarajn librojn, el kiuj mi notas tie ĉi: „Mallumaĵoj“ (trad.), „Libro de l' Humoraĵo“ (nova eldono), „La Kalendaro“ (orig.), „Fundamento de Esperanto“ (traduko por Hungaroj); mi aldonas al ili ankaŭ la hungarigon de la tiel nomata „Ĉefeĉa Ŝlosilo“.

Per unu el miaj verkoj, „Regno de l'Homoj“, mi sukcesis gajni la unuan premion de la

Zamenhofa literatura konkurso dum la Barcelona Kongreso en la jaro 1909. En aliaj literaturaj konkursoj mi partoprenis kiel prezidanto aŭ membro de la juĝantaro.

Sur la kampo de la propagando mi ne atingis multan sukceson. Al propagando mi ne taŭgis kaj ne taŭgas; vere, mi povus kalkuli per miaj manfingroj la personojn, kiujn mi esperantisitgis — krom miaj infanoj. Ĉar, kompreneble, la infanoj de esperantisto ankaŭ devas esti esperantistoj; ĉu ne vere? Kaj pardonu al mi tiun malgrandan patran vantecon, kara leganto, kaj permesu al mi diri, ke unu el miaj filoj, Paŭlo, en sia 15-jara aĝo, gajnis 100 frankan premion en la pariza Michelin'a Konkurso por la junuloj. (Hodiaŭ li estas la teknika aranĝanto de la „Literatura Mondo".)

Kun ŝveliĝinta koro mi atendis, en la jaro 1914, la Parizan Kongreson. Malrapidege pasis la tempo, kaj kun granda malpacienco mi kalkulis la monatojn, la semajnojn, fine la tagojn ĝis aŭgusto, kiam la fama mondkongreso, la krono de ĉiuj kongresoj, estis malfermota.

Per miaj spiritaj okuloj mi jam vidis la dolĉe ridetantan Anĝelon de l' paco, blanke vestitan, radiantan, kun brilanta stelo, kun sankta oleobranĉeto. Kaj la atendita tago fine alvenis ... ĝi alvenis ... kaj mia vizio disfalis ... la Anĝelo ploris ... lia blanka vestaĵo sangmakuliĝis, lia stelo estingiĝis kaj monstroj neniigis la oleobranĉeton ... ho, teruro ... teruro! — — — — — — — — —
— — — — — — — — — — — — — —
— — — — — — — — — — — — — —

Venis la mondmilito, honto de l' homaro.
— — — — — — — — — — — — — —

Kvin jarojn mi pasigis en malliberejo, kune kun mia familio!

Kiam la milito eksplodis, la franca registaro alvokis ĉiujn Germanojn, Aŭstrojn kaj Hungarojn loĝantajn en Francujo, ke ili tuj prezentu sin al speciala magistrato por esti internigita por la daŭro de milito. Tiamaniere mi ankaŭ devis min submeti al tiu ĉi malĝoja sorto, kaj oni forportis min, kune kun mia familio, en la urbeton Argenton-sur-Creuse, kaj de tie, post kelkaj monatoj, en Châteauroux, fine, en 1916, en Guérande. Mi ne volas tedi la leganton per la priskribo de la mizeroj suferitaj de ni en la malliberejo; sufiĉu diri nur, ke krom tiu malliberigo, oni konfiskis tutan nian havaĵon, kaj ne nur la monvalorantajn objektojn, kiel mebloj, litilaro, vestaĵoj, biblioteko k. t. p., sed ankaŭ la senvaloraĵojn tre karajn al mi: la familiajn relikvojn, portretojn, skribaĵojn, dokumentojn... ĉion, ĉion! lasante al ni nur la vestojn kiujn ni portis sur nia korpo. Do, mi ne havas plu gazetojn, librojn, neniun esperantaĵon; mi ne havas ekzemplerojn eĉ el miaj propraj verkoj!...

En Châteauroux, komence, estis permesite eliri el la malliberejo, por kelkaj horoj, je certaj kondiĉoj. Tie mi konatiĝis kun S-ro L. Moreau, delegito de l' Universala Esperanto Asocio en tiu urbo, kaj kun lia familio. Li estis tre afabla, amika al mi, ofte li invitis nin tagmanĝi ĉe li, kaj li sincere penis pli mildigi nian malfeliĉon. Tiam mi denove spertis, ke Esperanto ne estas nur lingvo; ĝi estas io alia...

Mia karega amiko, S-ro Th. Cart, sentigis al mi ofte la noblecon de sia koro. Li, kvankam neriĉa, helpis nin ne nur mone, sed ankaŭ alimaniere. Eĉ vestaĵojn li sendis por ni, kio estis neesprimeble valora donaco en tiu mizero.

Ankaŭ S-ro Frechas, la redaktoro de „Le Monde Espérantiste", kaj la jam mortinta S-ro Hodler, tiam redaktoro de la svislanda „Esperanto", helpis nin mone. Por tiuj du gazetoj mi eĉ sukcesis sendi artikolojn el la malliberejo — kompreneble ne *pri* la malliberejo!!!...

Estas preskaŭ nekredeble, ke, inter la malliberuloj de nia ejo, inter mil personoj proksimume, ne troviĝis eĉ unu esperantisto! Nur inter la soldatoj gardantaj la ejon mi trovis du samideanojn ... ili konsideris nin „malamikojn" tuj amikoj kaj ili taris en nia intereso kion ili povis ... Ja! Esperanto ne estas nur lingvo; ĝi estas io alia...

Mi jam diris, ke sur la kampo de la propagando mi neniam atingis grandan sukceson. Tamen, mi provis fari kurson en la malliberejo, mi havis dekon da lernantoj, sed bedaŭrinde nur unu persono el ili fariĝis serioza esperantisto: S-ro Fr. Pusztai, kiu estas hodiaŭ politeknikano en Budapest. Tiu energia junulo estas vera esperantisto, kaj li rajtigas esperi, ke en la estonteco li ludos gravan rolon en nia nobla afero.

*

En junio 1919, nia malliber eco finiĝis: oni transportis nin en Budapeŝton. En malsana stato mi alvenis en la ĉefurbon de mia malgrandigita patrujo, sed malgraŭ tio mi ne forgesis pri Esperanto, kvankam — mi konfesas — la teruraj travivitaĵoj multe malakrigis mian ĉiuspecan energion kaj volon. Tie ĉi mi baldaŭ konatiĝis kun la plej famaj hungaraj samideanoj; sed bedaŭrinde, mi ne povas tiel partopreni en la komuna vivo esperantista kiel mi volus, ĉar, kaŭze de la nunaj loĝmizeroj, ni devas loĝi ekster la urbo, kaj la komunikiĝo estas tre malfacila.

Tamen, por montri vivosignon mi verkis detalan esperantan lernolibron por Hungaroj, kiun eldonis la firmo „Kultura". Kaj nun, kiel vi scias, kara leganto, laŭ mia modesta povo mi partoprenas en la redaktado de la „Literatura Mondo"; mia unua laboro por ĝi estas tiu ĉi artikolo pri miaj rememoroj, kiu jen estas finita.

PAŬLO DE LENGYEL

# MANI*


## TURKA POPOLKANTO




Loĝas mi sur fora rok'
Vane sonas ama vok'.
Kiel nomi vivo ja
Vivon solan sen allog'?

Luno sur ĉielarkaĵ'...
Kiel iri nun en kaŝ'?
Sed se kaŝos sin la lun',
Mi aliros eĉ el maŝ'.

* „Mani“ estas senco, penso. La turka popolo kantas laŭ la supra melodio diversajn „mani“. La manidiro estas tre ŝatata popolamuziĝo. Jeti “mani“ signifas: konfesi amon.



ALEKSANDRO CHARPENTIER

LA VIOLONO

# GDE SI MOJA

UKRAJNA POPOLKANTO




# LA EMBUSKO

UKRAJNA BALADO DE A. MICKIEWICZ

El la laŭbo ĝardena vojevodo tremplena
En kastelon rapidas kurante.
Kun ekstrema ekscito ĉe edzina la lito
Li ekstaras neniun trovante.

Kun rigardo al tero, en pasia kolero
Li meditas, tordante lipharon.
Ne levante la vidon por ne vidi perfidon,
Li alvokas kozakon-tataron.

„Hej gardisto-azeno, kial en la ĝardeno
Nek la hundo, nek staras kozako?
Prenu tuj janiĉaran — la pafilon tataran
Kaj la duan kun mela la sako!“

Ambaŭ tute silente enŝteliĝas serpente
Tra ĝarden', al la laŭb de merizo.
En herbeja loĝio blankrebrilas jen io.
Tio estis virin' en ĉemizo . . .

Sub harligojn la ĉarmajn kaŝas lipojn ŝi varmajn,
La tolaj' kovras bruston tremantan,
Per la man' for de l' sino flankrepuŝas virino
Sur genuoj junulon starantan.

Kun la voĉo pasia diris li: „Kara mia,
Via kor' ĉu resonos neniam?
Eĉ por kora ekĝemo kaj amika manpremo
Vojevodo jam pagis por ĉiam?

Kvankam tiel fervore amis mi vin tutkore,
Al mi restis nur plor' kaj turmentoj,
Li ne amis, nek ĝemis, per la mono nur semis —
Kaj al li apartenas la sentoj!

Nun en horo vespera, sur la brusto mistera
Li la kapon dorlotas grizharan,
Kaj de lipoj mielaj kaj okuloj la helaj
Li eltrinkos dolĉecon nektaran!

Sur ĉevalo fidela, dum la nokto senstela
Venas mi tra la pluvo kaj koto
Por saluti vin kore, adiaŭi dolore
Sen ĝuado de dolĉa dorloto! . . .“

Ŝi ne aŭdas murmuron, li ripetas ĵejuron
Pri la amo kaj vortojn pasiajn . . .
Fine korektuŝita, de la sentoj venkita,
Inter brakojn enfalas ŝi liajn.

Vojevod' kun kozako por terura atako
Sin preparas en nokta silento:
Polvo en la pafiloj, kun streĉitaj tiriloj,
Atendante ĝis bona momento . . .

Sed subite kozako: „Al mi tremas la brako,
Mi ne povas mortigi pekulojn!
Ĉe l' retiro de l' ĉano al mi tremis la mano
Kaj la larmoj surfluis okulojn!“

„Malbenita hajduko! — jen por ci la eduko:
Mi ripetas nun fojon la lastan:
La pafilon pretigu, polvon plene enigu,
Poste pafu cin mem aŭ malĉastan!

Rekte kaj sen ŝancelo ci direktu al celo!
Antaŭ falu la kap' de l' junulo!“
Ekcelinte, ekpafis la kozak' kaj ektrafis . . .
En la kapon — de sia suprulo.

D-ro LEONO ZAMENHOF

Laŭ la rimarko de l' tradukinto ĉi tiu traduko ne intencas konkuri kun la belega kaj klasika traduko de l' Majstro, aperinta en la Fundamenta Krestomatio. Ĝi volas nur pruvi, ke en Esperanto, malgraŭ la rim-malriĉeco, oni tamen povas retraduki eĉ rimriĉan poemon kun tute malsamaj rimoj.

## NIAJ EMINENTULOJ



Prof. TH. CART
Prezidanto de la Esperanta Akademio

# MONDLITERATURA OBSERVO

PRI LA LIVA LITERATURO. — La malgranda liva nacio, kiu loĝas nuntempe en 12 vilaĝoj de la kurlanda duoninsulo, estas parenco de la Estonoj kaj Finnoj kaj parolas lingvon similan al la ilia. Ĉar la nacio estas tre malgranda, ĝi ne havis propran literaturon ĝis la mezo de la pasinta jarcento. Pli frue estis aperintaj nur kelkaj livaj frazoj en alilingvaj verkoj kaj „Patro Nia" en la jaro 1828-a.

La fondinto de la liva literaturo estas akademiano F. J. Wiedemann. En la jaro 1861-a li eldonis sian livan gramatikon. En ĝi troviĝas sur 200 grandaj paĝoj liva teksto, konsistanta el popolkantoj, rakontoj, proverboj, enigmoj, kelkaj tradukoj el la Biblio kaj tradukitaj religiaj kantoj. Wiedemann volis havigi al la Livoj ankaŭ pure livan libron. Per helpo de du livaj instruistoj li tradukis la evangelion de S. Mateo en ambaŭ livajn dialektojn. La tradukoj povis aperi en la jaro 1863-a. Ĉiu Livo volis havi ilin kaj baldaŭ elĉerpiĝis la eldonoj, oni devis reeldoni ilin. Longtempe estis tiu ĉi evangelio la sola livlingva libro.

La liva literaturo povis pliriĉiĝi nur dum la lastaj jaroj. Tion kaŭzis la „revekiĝo" de la Livoj. Vidante kiel liberiĝis aliaj nacioj de la antaŭa granda Ruslando, volis la Livoj ankoraŭ en la 11-a horo trovi rimedon kontaŭ la perdiĝo de ilia nacio. Inferalie estis eldonitaj kelkaj verkoj pri la vivo de la Livoj, pri ilia historio, kaj malgranda kolekto de poeziaĵoj de la liva poeto *K. Stalte.* La poeto, loĝanta inter la popolo, tre bone konas la vivon de sia nacieto, kunsentas ĝiajn ĝojojn kaj dolorojn kaj kuraĝigas ĝin, kiom estas necese. La plej bonaj el la ĝis nun aperintaj kantoj de K. Stalte estas *La Kanto de Livoj* kaj *La Patrino.* La lasta estas rebrilo de la vivo de l' livaj fiŝkaptistoj. La tero en la livaj vilaĝoj estas malbona kaj la homoj devas serĉi sian ĉiutagan panon sur la maro. Sed la maro estas tre oferpostulema kaj multaj infanoj perdas sian patron kaj edzinoj sian edzon.

Ekster Livujo la liva literaturo estas tre malmulte konata. Dank' al nia estona samideanino la Esperanta publiko povas iom konatiĝi kun la liva poezio, nome kun *La patrino,* kiu sekvas sube. P. BERG

### LA PATRINO
K. STALTE

Ho kial iradas, patrino al mar',
ho kial allogas patrinon ondar'?
Ĉu iun atendas sopire patrin'
verŝante nun larmojn amarajn sen fin'?

Sur maron veturis ja fil' ŝia for...
„Al vi ne revenos plu via trezor',
(revenis aliaj kaj diris al ŝi)
La filon, patrin', ne atendu plu vi."

La filon de ŝi jam forrabis la mort'...
Kaj ŝi, ke la ondoj lin rulu al bord',
atendas, por tombon pretigi al fil':
ripozon li trovus sur fund' en trankvil'.

Plej bele ŝi farus ĝin por la filet'
kaj tie ŝi sidus en plena kviet'.
Ŝi pensus ke estas la fil' en ĉiel'...
Revidi lin tie, — jen jam ŝia cel'.

El la liva: HILDA DRESEN

LA „OLD VIC" TEATRO. — La bela poezia dramo „Britains Daughter" (La filino de Britujo) verkita de Sordon Bottomley estis prezentata por la unua fojo ĉe la „Old Vic" Teatro, dum novembro. La aŭtoro estas juna, moderna dramatisto, kies verkoj ne estas bonekonataj, sed la citindaj strofoj, daŭra intereso kaj harmonia perfekteco de la poezio meritas grandan laŭdon. La intrigo estas simpla kaj efika.

Nest, reĝino de Britujo, estas venkita de la Romanoj, kiuj forvojaĝas, prenante ŝin, kune kun aliaj britaj virinoj. Nest estas duoble malfeliĉa, ĉar ŝi ne nur perdas sian landon, sed estas riproĉata de la virinoj pro la mizero kaj mortoj kaŭzitaj de sia ribelo kontraŭ la Romanoj.

La du flankoj de milito estas klare videblaj; la triumfaj, brile-vestitaj soldatoj, la venkintoj, kaj la plorantaj, frenezigitaj virinoj, la venkitoj. La ankro leviĝas al la kombinitaj sonoj de marista ĉanto kaj virina lamento. Tiel videbliĝas la fakto, ke la gloro de milito estas nepre bazita sur doloro.

La malnova dramo „A New Way to pay old Debto" (Nova metodo por pagi malnovajn ŝuldojn), verko de Philip Massinger (1583—1639) sekvis. Ĝi malsimilas la dramojn de Skakespeare, ĉar *liaj* roluloj estas homaj estaĵoj, sed tiuj de Massinger estas homaj ecoj personigitaj. La ĉefrolulo, Sir Giles Overreach (Superruzulo) enkarniĝo de Kruela avareco, fiere fanfaronas pri siaj malnoblaj agoj, ĝis fine, superita en sia ruza plano, li freneziĝas pro furioza ĉagreno. Lia agento, Mar-all (Difektu-ĉion), estas malforta imitaĵo de sia mastro, kaj la pacjuĝisto Greedy (Manĝama) neniam perdas okazon proklami, ke „lia Dio estas lia stomako".

La bela parolmaniero de Lady Allworth kaj ŝia viglеco aldonas al la ĉarmo de la dramo kaj elstarigas la pli trankvilan sintenadon de Margaret Overreach, filino de Sir Giles. Kiel ĉiam en la „Old Vic"aj teatraĵoj, la plej malgravaj roloj estis zorgeme studitaj kaj donis la komikan reliefon kiu pli forte emfazas la finan teruran scenon en kiu la venkita Superruzulo freneziĝas. La prezentado de Sir Giles estas triumfo

por Robert Atkins, ĉar ĝi estas malfacila rolo. La ĉeestantaro sekvis la scenon kun streĉita atento kaj varme aplaŭdis la sukcesan aktoron.

La famkonata Edmund Kean ludis tiun rolon ĉe Drury Lane Teatro en 1816, kun tiu potenco, ke unu el la aktorinoj svenis, alia laŭte ploris, Lord Byron en la aŭdantaro falis en konvulsion kaj virinoj kriegis pro teruro.

Tiu speco de dramo evoluis el la mezepokaj moralecaj dramoj, en kiuj la virtoj kaj malvirtoj estas personigitaj. Tiun kutimon ankaŭ sekvis Edmund Spenser (1552—1599) en „La reĝino de Felando" kaj Joha Bungan (1628—1688) en „La progresado de la pilgrimo". Sed la homa karaktero ne konsistas el unu sola virto aŭ malvirto. Nuntempa verkisto prezentus superruzulon senkompate okupiĝantan je liaj planoj por atingi prosperon, riĉaĵojn aŭ honorajn titolojn, sed samtempe bonmanieran, afablan al liaj familianoj, respektatan de liaj kunuloj, eĉ donacantan al hospitaloj kaj almozinstitucioj.

Tia estas Grafo Cazotti en „The foreing House" (La kreskiga varmejo), nova dramo de Israel Zangwil. Li mensogas kaj trompas ĉiujn en sia triumfá progreso, sed spite de siaj malnoblaĵoj, li estas ĉarma homo. EMMA L. OSMOND

## BIBLIOGRAFIO

DU KOKCINELOJ; LA MONTRO. — Noveloj de Géza Gárdonyi. Trad el la hungara K. de Kalocsay. Rekomendita de la E. L. A. Prezo: sv. fr. 0.25.

Modesta eksteraĵo, valora enhavo, ĉi tio karakterizas la eldonaĵojn „Per Esperanto al la tutmondo", kies kvina kajero estas ĉi tiu libreto. „Du kokcineloj" estas rakonto pri la malfeliĉa sorto de blinda kamparanino. Ŝi sopiras je amo, flirtas kiel papilio ĉirkaŭ la flamo kiu feliĉe brulas en la koroj de junulo kaj de ŝia fratino. Kaj la fajro kaptas ŝin kaj en la fajro cindriĝas ŝiaj flugiloj, ŝia koro. Simplaj, ĉiutagaj interparoloj, simplaj ĉiutagaj okazaĵoj estas tie simple rakontitaj, sed per ili ni vidas profunde en la baraktantan koron de la kompatinda, naiva knabineto. „La Montro" estas skizeto prezentanta karakterizan trajton de la hungara popolanimo. — La traduko estas brilanta ekzemplo de tio, kiel freŝa, vivanta estas nia lingvo. Ĝi fluas, nenie artefaritaj frazkonstruoj, nenie artifikaj vortkunmetoj, mi tute forgesis dum lego, ke mi ne legas en mia gepatra lingvo. Verŝajne ĝuste la simpleco, la pena evito de nenaturaj vortkunmetoj instigis la tradukinton por kelkaj neologismoj. Mi trovis kvar: *ambli* (iri havante tempon), *langvoro* (malŝtreĉiĝo de korpo, animo), *ŝrumpi* (kuntiriĝi pro seko, malsano), *stumbli* (faleti). — La aparta ĉarmo, arta simpleco de la originalo, la kvazaŭ instrue valora, klasika traduko faras ĉi tiun kajeron vere perleto de nia tradukliteraturo. Ĝi devus esti en mano de ĉiu literaturamanta Esperantisto. *(-las)*

DUONSURDA. — Duakta komedio, de Roksano. Dua eldono.

La „dua eldono" montras, ke la komika tragedio de duonsurda fianĉo ne maltrafis la plaĉon de la Esperanta legantaro. La strukturo de la verko estas tre bona; jam post kelkaj frazoj ni ekscias la kaŝatan „malĉarmeton" de la fianĉo, kaj time ni atendas la konfliktojn certe okazontajn. Lertaj aktoroj nepre bone amuzos per ĉi tiu komedieto, kaj knabinkoroj, kiuj premiĝas dum la konfliktój, kontente ĝuos la feliĉan finevoluon antaŭ la falo de l' kurteno. — La stilo estas ĝenerale korekta kaj flua. La interparoloj estas viglaj, interesaj. Nenia enuo, la komedio marŝas vigle ĝis la fino. — Kelkfoje oni sentas el la stilo, ke la aŭtorino estas franca, sed tio neniam ĝenas aŭ embarasas. Tamen mi faras kelkajn riproĉetojn. En la monologoj, precipe en la komenco, la frazoj estas iom tro komplikaj; pli simpla frazkonstruo estus pli plaĉa. La aferoj rilataj al esperantismo (kelkaj linioj), laŭ mia opinio, estas iom perforte alportitaj; la verketo eble gajnus se oni forstrekus ilin. Kaj estas kelkaj, nemultaj vortoj tro artefaritaj, nekutimaj (malĉarmeto, ploremulino, gesencerbuloj, plezurriĉa, korpremateco, karegulino); ili ja estas gramatike senriproĉaj, tamen al mi ili sentigas, ke mi legas en artefarita lingvo. — Sed ankaŭ la malgraveco de ĉi tiuj riproĉetoj montras la bonecon de la verko. Ĝi estas tre rekomendinda por Esperantaj teatraj vesperoj. *(-las)*

## DISPUTO

RESPONDO. — Estimata sinjoro! En via dua numero vi sciigis morton de KOMPATINDA POETO, kiu fariĝis freneza. Sed ĉar en sia senkonscienco li subskribis sian leteron parte per mia nomo, permesu al mi kelkajn vortojn pri la afero.

Kiel mi lin kompatas!

Unue li verkis originalajn poemojn! Ĉu li ne komprenis, ke aŭtoro havas *devige* sentojn kaj ideojn de sia raso ke li povas nur traduki en Esperanton verkon nacie pensitan, se ne — skribitan; ke aliaj popoloj povos ŝati fremdajn verkojn nur se ili vidas ke ĝi reprezentas ideojn de alia popolo, dum ili trovus ĝin malbona aŭ ridinda, se ĝi intencus reprezenti iliajn naciajn sentojn, kiel volas fari verko Esperante skribita.

Due, li interesiĝis pri estonto de Esperanta poezio, li volis ke ĝi estu vere internacia!

Samtempe li konfesis, ke ĝi estis farita laŭ imito de lingvoj de Centreŭropo. Ke ĝia ritmo estas aŭdebla nur de popoloj kiuj havas similan versfaradon, aŭ de personoj kiuj bone konas iun el tiuj lingvoj. Preskaŭ ĉiuj tradukoj devenas el tiuj lingvoj.

Utopio estas la internacia mondliteraturo, almenaŭ por poezio. Jes, oni havas tradukojn versajn de Shakespeare, Byron, Goethe, Schiller, Puŝkin. Sed estas aliaj poetoj famaj: Corneille, Racine, Molière, V. Hugo, Dante, Petrarca, Ariosto, Camoens ktp· Kiaj verkoj estas tradukitaj el franca literaturo?

Kelkaj poemoj, preskaŭ ĉiuj tradukitaj de nefranco, unu komedio de Molière tradukita de Sudamerikano, Fabloj de Lafontaine, laŭ speciala ritmo kiu intencas imiti la francan. Mi ne konas aliajn. La lingvo de la Kanto de Rolando ne estas jam la franca, sed ankoraŭ la romana.

Do nur kelkaj Esperantistoj komprenas versojn. Por la aliaj, poezio ne ekzistas, ili eĉ ne legas ĝin.

Ĉu do Esperanto ne povas havi poezion vere internacian? Ĉu mondliteraturo ne povas ekzisti ankaŭ por poezio? Mi ankaŭ serĉis solvon de la problemo. Se mi ne fariĝis freneza (almenaŭ mi tion kredas), miaj haroj blankiĝis. Ofte mi ne povis dormi ripetante provaĵojn de ritmoj kiujn mi faris tradukante la „Juna Tarentanino" de André Chénier:

Ploru, vi alcionoj, vi mildaj birdoj sanktaj,
Vi al Tetiso karaj, ho vi alcionoj ploru.

Ĉu bone? Mi aŭdas tion mezuran ritmon, ĉar la franca poezio estas ankaŭ mezura. Sed la aliaj eble ne aŭdos ĝin. Ni provu ritmon nur laŭ akcento:

Vi alcionoj ploru, ho vi birdoj sanktaj
Amataj de Tetiso, ploru alcionoj,

Tio estas tute regula laŭ la nuna versfarado, sed mi aŭdas nenian ritmon kaj certe ne aŭdos, se mi volas ke ritmo devenu de elparolado kaj ne elparolado de ritmo:

Vi ploru alcionoj, ho vi birdetoj sanktaj.
Amataj de Tetiso, vi alcionoj ploru,
Ŝi vivis bela Mirto, Tarentanino juna
Ŝipego ŝin kondukis al Kamarinaj bordoj...

bone, mi aŭdas ritmon kaj ĉar tio estas, plie, regula laŭ la nuna versfarado, jen estas eble solvo.

Kaj dum mateno venas, mi ankoraŭ pensas:

Nun ŝi vivis Mirto, Tarentanino juna,
Ŝin transportis ŝipo ĝis Kamarinaj bordoj,
Kaj Himeno, kantoj, flutoj ŝin estis ĝoje
Kondukontaj baldaŭ ĝis la fianĉa sojlo.

Aŭ:

Alcionoj ploru, ho vi birdoj sanktegaj,
De Tetis' amataj, vi ploru alcionoj,
Ŝi vivis nun Mirto, juna Tarentanino...

Se mi ne provis ritmon senegalan aŭ botokudan, estas nur ĉar mi ne konas ilin. Se iu povas konatigi ilin, mi lin tutkore dankos. Eble tio helpas al solvo de la problemo.

Kredu vin Esperante via
NAMIL LAB

ESTIMATA SINJORO!

Por defendi la memoron de la kompatinda poeto, mi devas fari kelkajn rimarkojn pri via Respondo.

Vi tuŝas en via letero tre gravajn demandojn. Ebleco de originala verkado, formo internacia de la Esperanta verso: ĉi tiuj du demandoj ampleksas ja la tutan problemon de la Esperanta poezio. La Muzoj staras angore ekster la pordo kaj time atendas kion oni decidos pri ili.

Rilate la unuan punkton: kara Sinjoro Namil Lab, mi ne komprenas vian konkludadon. Vere, ke aŭtoro havas eĉ kontraŭvole la pensojn kaj ideojn de sia nacio, vi ja povas legi en certa poemlibro: „Mi forte radikiĝas en kara ter' nacia, El ĝi suĉita estas ja tuta forto mia.“ Humoro, pensmaniero, mondrigardo, inklinoj, tono, stilo, ĉiuj estas nepre determinitaj de la raso, manifestiĝante en delikataj nuancoj nedifineblaj, sed tuj rekoneblaj kaj karakterizaj. Se Ibsen estus verkinta en Esperanto, ni tamen rekonus el la verkoj la Nordulon, same kiel en Anatole France la francan aŭ en Dostojevskij la Ruson. Kaj kie vi trovas en la certa poemlibro aŭ en la tuta originala Esperanta literaturo la intencon: reprezenti la sentojn kaj pensojn de aliaj popoloj? Kaj eĉ se vi trovus tion, ĉu tio estus nepre ridinda kaj malbona? Ĉu Goethe en „Ifigenio en Taŭrido“, Pierre Loti en „Sinjorino Krizantemo“, Romain Rolland en la unua volumo de „Jean-Cristophe“ ridigas vin. Min ne. Same ne, kiel la france verkita „Sankta Sebastiano“ de d'Annunzio, aŭ la france verkita „Salome“ de Oscar Wilde. Kion ili povis fari, ĉu tion ne povus provi ankaŭ Esperanta poeto? Kaj ĉu ne povas provi iam genia poeto, kies kiso, kiel la kiso de reĝido vekos por pompebrila vivo la dormetantan Dornrozeton?

Kaj jen mem André Chénier. Kial li faras poemon pri la morto de Myrto, imitante la epigramojn de la „Antologio“? Aŭ kial li ne verkis ĉi tiun poemon en sia „patrin“-lingvo? (Lia patrino ja estis greka.) Kaj kial ĝi plaĉas al vi? Ĉar ĝi estas bela! Kaj la beleco estas la sola valormezurilo de la poemoj, ne aliaj aprioriaj principoj tre kontesteblaj.

Rilate al la dua punkto mi ripetas: ritmaj reguloj devenas el la karaktero de tiu lingvo en kiu oni versas, kaj ne de tiu el kiu oni tradukas. La mezura verso ne estas aplikebla en Esperanto, kie la forta akcento kvazaŭ forŝovas la mezuron (dependantan de la konsonant-nombro de la silaboj).

Jen ekzemplo:

Perdita migras jen tra val' infano kaj ploras ege.

Ĉi tio estas perfekta heksametro laŭ la latina verss farado, sed ĉu estas Esperantisto, kiu ĝin sentas heksametro? Male:

Migras infano tra valo perdita kaj ploras li ege...

estas laŭ la latina prozodio terura fuŝaĵo, kaj tamen perfekta Esperanta heksametro.

Sed laŭ mia opinio ankaŭ la franca ritmo ne estas mezura, sed akcenta:

Pleurez, doux alcyons, ‖ ô vous, oiseaux sacrés

estas perfekte imitebla laŭritme per:

Ho alciona ar', ‖ ho sanktaj birdoj vi...

Se en la ceteraj linioj ni trovas lokojn kontraŭajn al ĉi tiu skemo, tio estas klarigebla per tio, ke la franca akcentado tute ne estas tiel akra kiel la Esperanta. La unusilabaj vortoj neakcentitaj, la mutaj *e* vokaloj faras la elparolon tre elasta, la fluanta lingvo nur kelkfoje jetas ondon en la ekfrapantaj finvokaloj. La franca lingvo glitas, la Esperanta pulsas. En ĝi pekojn kontraŭ ritmo oni sentas kvazaŭ malregulan batadon de malsana koro.

Do la Esperanta ritmo estas pli rigida. La franca ritmo kontraŭe estas tiel elasta, ke oni kelkfoje apenaŭ sentas ĝin. Ĝuste tial estas esenca faktoro de la franca verso — la rimo, sen kiu la versoj disfluus en prozon.

Kaj jen kion mi miras, kara Namil Lab. Vi penas kun ekstrema fortostreĉo kopii la ritmon, ĉi tiun ne esencan faktoron de la franca verso, kaj tute ignoras ĝian ĉefan karakterizilon — la rimon. Mi vere kompatis la belegan poemon de Chénier, kies rimojn via traduko kruele disŝiris, kaj kiu aspektas nun kiel senfoliigita arbo. Mia kompato naskis la decidon retraduki ĝin.

Mi ne uzis tute la originalan ritmon, ĉar la vira finiĝo antaŭ la cezuro estis min deviginta por tiaj ŝanĝoj de la teksto, kiujn ne valoras ĝia konservo. Do antaŭ la finiĝo mi uzis virinajn finiĝojn.

Esperante ke la traduko plaĉos al vi kaj savos vin de la harblankigaj zorgoj, mi restas fidele via

KOPAR

## LA JUNA TARENTANINO

### ANDRÉ CHÉNIER

Ho ploru alcionoj, ho sanktaj birdoj vi,
Amataj de Tetiso, ho ploru jam kun kri'!

Ŝi vivis, juna Myrto, Tarentanino bela,
Al Kamarinaj bordoj ŝin portis ŝipo vela;
Himeno, flutosonoj kaj mildemola kant'
Ŝin estis kondukantaj al sojlo de l' amant'.
Gardata de ŝlosilo, en cedroligna kesto,
Fermita estis robo por geedziĝa festo
Kaj oro por ornamo de ŝia braka par',
Parfumoj preparitaj por ŝia blond-harar'.
Sed dum sur antaŭkilo ŝi sola miras stelojn,
La vento, tre impeta kaj plenblovanta velojn,
Ŝin puŝas. Terurite, sen vid' de l' ŝipanar'
Ŝi falas, ŝi ekkrias... ŝi estas en la mar'.
Ŝi estas en ond-sino, Tarentanin' gracia,
Ruliĝas sub la ondoj jam bela korpo ŝia.
Tetiso, larm-okule, en iu roka kav'
De diskarnemaj monstroj ekkaŝis ĝin por sav'.
Kaj belaj nereidoj laŭ ŝia ordonvoko
Ĝin milde suprenlevis el la malseka loko
Ĝin ŝovis al la bord' kaj en jena tomba sin'
Ĉe l' promontor' Zefira demetis mole ŝin.
Kaj nimfojn, kunulinojn, alvokas ili krie
El boskoj kaj de fontoj, de montoj kaj de ĉie
Kaj ĉiuj frapas bruston, funebras longe ĝin
Kaj veojn ĉirkaŭ ĉerko ripetas sen la fin'.
Ho ve, al la amanto portita vi ne estis,
Nek via korpon robo la himenea vestis,
Nek brakojn ĉirkaŭligis juvela oro-ĉen',
Nek kapon ornamadis rubando de Himen'.

*La bildon de nia kovrilo desegnis S-ro Antono Losonczy*

ANONCOJ:
GRANDAJ LAŬ INTERKONSENTO!
MALGRANDAJ:
PO DU ENPRESOJ LA PREZO DE UNU NUMERO!
PAGO NEPRE ANTAŬE!

SPECIMENA BOTELO: 10 SVIS. FR.
SPECIMENA BOTELO: 25 FRAN. FR.
BULGARA ROZOLEO
LA FAMA BONODORAĴO POR PARFUMAĴOJ, SAPOJ — KAJ TIEL PLU
UNUAKVALITA, POGRANDE & POMALGRANDE
*
IVAN KRESTANOFF, EKSPORTOFICEJO
WINTERGARTENSTRASSE 9, DRESDEN A.

INTERNACIA FOIRO EN PRAHA
(Ĉeĥoslovakujo)
Informojn donas: PRAŽSKÉ VZORKOVÉ VELETRHY Staroměststká radnice PRAHA
Esperanto korespondata!


PAN YAN
EN LA TUTA MONDO LA PLEJ BONAJ
VINAGRA KONSERVAĴO KAJ SAŬCO
Pro sia unika, tre agrabla gusto ili jam atingis lokon ĉe la publiko pli altan ol ĉiu alia.
*
La diferenco kuŝas ĝuste en tio, ke ili atingis la plej altan gradon de bonegeco.
*Vendataj ĉie en boteloj de du grandoj je modera prezo*
Solaj posedantoj:
MACONOCHIE BROSS., LTD
LONDON, E. 14

La evoluon de la grafikaj industrioj servas la interesa
MAGYAR GRAFIKA
(HUNGARA GRAFIKO)
BUDAPEST VI, ARADI-UTCA 8
Ĉiuj, kiujn interesas la grafiko de l' arto, mendu ĝin! Unu numero kostas hungaran K 250.—

MODERNAJ ROBINZONOJ!
? ? ? ? ? ? ? ? ? ? ? ? ?

*Könyves Kálmán r.-t.*
Fama eldonejo de reproduktaĵoj por artaj bildoj! Desegnaĵoj, pentraĵoj de mondfamaj artistoj! Rekomendas siajn eldonaĵojn Petu ilustritan prezaron kontraŭ 2 svisaj frankoj
*Budapest VI, Nagymező-utca 37—39*

„PLUMET“ La plej bona el la digestigaj likvoroj
*Ĉie aĉetebla!*
DISTILEJO DE BONGUSTAJ LIKVOROJ „LE PLUMET“
GAND -:- Place St-Bavon, 14, St. Baafsplein -:- GENT

ORIENTO!
Havigu al vi tuj la interesplenajn literatur-historiajn verkojn, kun trikoloraj etnografiaj kartoj, en plej konciza Esperanto, laŭditaj de ĉiuj:
LA BULGARA LANDO KAJ POPOLO
LA NAJBAROJ DE RUSLANDO
Kontraŭ 1 dol., 5 sv. fr., 10 fr. fr., 25 ĉ. kr., 500 g. mk. (laŭ la monvaluto de l' mendinto) sendas rekomendite la aŭtoro:
IVAN H. KRESTANOFF
*Dresden—A., Wintergartenstrasse 9. Germanujo.*

Ĉiu konscia esperantisto devas esti membro de la oficiala mondorganizacio

**U. E. A.**

Aliĝu tuj ĉe la delegito de via loko aŭ ĉe la Centra Oficejo de

**UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO:**
12, BOULEVARD DU THÉÂTRE
GENÈVE, SVISLANDO!

*Sensacio de nia Literaturo!*



LA
**POEMARO DE JULIO BAGHY**
APEROS

ABONPREZOJ: Simpla kaj bela eldono Sv. fr. 1
Luksa eldono kun portreto kaj subskribo de la poeto Sv. fr 2

*Sendu la abonprezon en naciaj bankbiletoj aŭ iel ajn al*
**„LITERATURA MONDO"**
BUDAPEST VI, ANDRÁSSY-UT 8 (HUNGARUJO)



POR LA PREZO DE TIU ĈI NUMERO AŬ POR DU 60 CENTIMAJ RESP.-KUPONOJ:

**5 LEGINDAJ LIBRETOJ**

(SERIOZAJ KAJ HUMORAJ RAKONTOJ, TEATRAĴETO, POEMOJ, NOVELOJ K. T. P.)

MENDU TUJ ĈE: PAŬLO BALKÁNYI
BUDAPEST VI, HAJÓS-UTCA 15

ATENTU! **BABILADOJ DE BONHUMORA ZAMENHOFANO** ATENTU!
DE JOŜO
kaj
**AKORDOJ ESPERANTAJ**
DE M. L. KAPLAN

estas riceveblaj ambaŭ kune por 6 nove stampitaj respondkuponoj ĉe

J. ŜAPIRO
LIPOVA 33, BIAŁYSTOK (POLUJO)

FONDITA EN 1847 — FONDITA EN 1847

**BANQUE DE FLANDRE**
ANONIMA SOCIETO EN GENT

KONSERVADO DE OBLIGACIOJ KAJ TITOLOJ
DEPONAĴAJ KAJ DUONMONATAJ KONTOJ
DISKONTO KAJ ENKASIGO DE BILOJ
AĈETO KAJ VENDO DE OBLIGACIOJ
PRUNTEDONO SUR OBLIGACIOJ
ENKASIGO DE KUPONOJ
LUIGO DE MONKESTOJ
KREDITLETEROJ
KTP., KTP.

ĈIUJ BANK-AFEROJ! — ĈIUJ BANK-AFEROJ!

ARTPLENAJN FOTOGRAFAĴOJN

FARAS

**DISKAY**



BUDAPEST
VII., RÁKÓCZY-UT 72

KIU NE POVAS ABONI „LITERATURA MONDO"-N EĈ POR DUONJARO



**MENDU ĜIN PONUMERE!**

*PROFITU PER „LITERATURA MONDO";*

Kolektu abonantojn ankaŭ alilandajn. Post du abonantoj vi ricevas L.M. dum duonjaro senpage, post kvar por tuta jaro. Vendu po numeroj. — Reprezentantoj rajtas depreni 20% de la abonprezo.

HUNGARA
**NUTRAĴLIVERANTA KAJ KOMERCA A. S.**



IMPORTO — EKSPORTO

ADMINISTREJO:
BUDAPEST, V., FÜRDŐ-UTCA 2.

Globus presartinstituto A. S., Budapest. Direktoro Nikolao Biró.